

1976 julio – aŭgusto

69-a jaro


n-ro 847-8 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



estrara
raporto
1975–76



Vi trovos

ke ĉi tiu numero de la revuo efektive ne estas revuo sed Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum la laborperiodo 1975/1976. La pasintjara aranĝo, ke la raporto estu presita en aparta broŝuro kaj senpage havebla kontraŭ peto al la Centra Oficejo, montriĝis iom neefika rilate la nombron de tiaj petoj. Ĉar por bona agado por Esperanto restas esenca afero, ke la tuta membraro de UEA estu kiel eble plej bone kaj ĝisdate informita pri la Asocio kaj ĝia multflanka kaj plurkampa aktiveco, la Estraro opiniis, ke la plej rekta vojo por atingi kiel eble plej grandan nombron da legantoj estas publikigi la Raporton kiel revuan numeron. Kompreneble, ke ian rolon en ĉi tiu decido ludis ankaŭ la daŭraj lastatempaj klopodoj de la Estraro raciigi la uzadon de la disponeblaj homaj fortoj kaj financaj rimedoj, organizante la aferojn tiel, ke ne nur la Raporto atingas la plej vastan publikon, sed ankaŭ nia revuo tiel sukcesas almenaŭ provizore solvi la demandon de sia akurateco.

Enhavo

Raporto de la Estraro pri la agado de Universala Esperanto-Asocio dum la jaro 1975/1976:

- 117 Enkonduko, Ĝeneralajoj, Administrado
- 119 Financoj (A. Financa Programo, B. Konto de kostoj kaj enspezoj en 1975, C. Bilanco je la 31a de decembro 1975, Ĉ. Fina rimarko)
- 121 Institucio Hodler '68, Revuo, Kongresoj
- 122 Informado
- 124 Eksteraj rilatoj (A. Ĝenerala trarigardo, B. Internaciaj registaraj organizaĵoj, C. Internaciaj neregistaraj organizaĵoj, Ĉ. Registaroj kaj nacia agado)
- 127 Kultura agado (A. Ĝenerala trarigardo, B. Kulturaj eventoj, C. Servoj kaj komisionoj)
- 128 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
- 130 Landa kaj faka agado
- 132 Esploro kaj dokumentado
- 133 Finaj vortoj
Financaj aldonajoj:
Spezoj de UEA en 1975
- 134 Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1975
- 135 Revizora raporto, Revizora deklaro pri la jaro 1975
Buĝeto de UEA por la jaro 1977
- 136 Spezkonto de la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago
Korektoj de la Estrara Raporto 1974/1975

La kovrilo

La mozaiko sur la kovrila paĝo celas aludi nur al kelkaj gravaj eventoj aŭ al memorindaj nomoj kaj datoj en la vivo de la internacia Esperanto-movado dum la pasinta laborperiodo. Cetere, ĉiuj ĉi fotografiaĵoj jam aperis en nia revuo inter septembro 1975 kaj aprilo ĉi-jare kaj estu lerniga distro serĉi la ĝustajn bildklarigojn tra la revunumeroj. Unu aŭ du el la kovrilaj fotografiaĵoj ne havas rektan ligon kun UEA kaj ĝia aktiveco aŭ tiel almenaŭ ŝajnas esti. Pro la fakto, ke la Raporto de la Estraro jam tradicie estas la sola jara trarigardo de la atingajoj de la internacia Esperanto-movado, estas fakte malfacile trovi ion kio koncernas la Movadon kaj samtempe ne koncernus la mondan Esperanto-organizaĵon.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono: (215) CL9 - 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

RAPORTO DE LA ESTRARO

PRI LA AGADO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO DUM LA JARO 1975/76

1. ENKONDUKO

Plenumante la artikolon 30 de la Statuto, la ĝenerala sekretario de UEA kompilis tiun ĉi raporton kunlaborante kun la diversaj estraranoj, la direktoro kaj vicedirektoro de la C.O. kaj unu-du komisiitoj pri specialaj agadoj.

La raporto kovras la periodon de la 1-a de aprilo 1975 ĝis la 1-a de aprilo 1976.

En sia tritaga kunsido de la 10-a – 12-a de aprilo 1976, la estraro decidis aperigi ĉi-jare la kompletan estraran raporton en la julia-aŭgusta numero de la revuo 'Esperanto', tiel ke ĉiuj membroj, ricevantaj regule la organon de UEA, havu la okazon konatiĝi kun la multfaceta laboro de la Asocio sur la plej diversaj kampoj.

La C.O. volonte sendos la raporton al tiuj membroj, kiuj ne estas samtempe abonantoj de la revuo, se ili turnos sin al la C.O., petante alsendon.

2. ĜENERALAĴOJ

(1) Statuto: La 8-an de decembro 1975 finiĝis Ĝenerala Voĉdono pri pluvalidigo de la Statuto de UEA – konforme al la nederlanda juro – por plia periodo de 29 jaroj. Sen tiu aprobo, la jura ekzisto de la Asocio estus finiĝinta la 27-an de aprilo 1976. Estis ricevitaj 19 469 voĉoj, el kiuj 241 estis teknike nevalidaj. Ĉiuj aliaj voĉoj estis jesaj. Sekve la Estraro entreprenis paŝojn por havigi la nederlandan reĝan aprobon. Tio neniel malhelpas, ke eventuale okazu pluaj statutŝanĝoj en la venontaj jaroj.

(2) Honora membraro: Forpasis fine de 1975 D. Kennedy (Britujo), kaj en februaro 1976 prof. K. Kalocsay (Hungarujo). Okaze de la UK en Kopenhago estis elektitaj 7 novaj honoraj membroj: A.D. Atanasov (Bulgarujo), R. Bugge-Paulsen (Norvegujo), E. Dahl (Svedujo), H. Dresen (Soveta Unio), M. Haudebine (Francujo/Hinda Unio), M. Starr (Usono) kaj M. Sygnarski (Pollando). La nombro de HM estas nun 17.

(3) Komitato: En junio 1975 okazis nova baloto de la delegitoj pri 4 vakaj lokoj por komitatanoj B. Estis elektitaj el 7 kandidatoj: R. Markarian (Britujo), T. Tyynelä (Finnlando), W. Jansen (Nederlando) kaj B. Kolker (Soveta Unio). Rezulte de tiu kompletigo, la komitatanoj A kaj B povis en Kopenhago elekti plian komitatanon C: s-ron G. Maertens (Belgujo). Fine de aŭgusto 1975 malfondiĝis la aliĝinta korea landa asocio okaze de la fondo de nova organizaĵo. Sekve de tio provizore forfalis el la Komitato ĝia komitatano A. Okaze de la aliĝo al UEA de Universala Medicina

Esperanto-Asocio, tiu faka asocio nomis kiel komitatanon A d-ron I. Ferenczy (Hungarujo). Dum la jaro okazis pluraj anstataŭigoj de komitatanoj A konforme al la Statuto, kaj en 1976 la Komitato perdis pro forpaso la observanton de Esperanto-Grupo de Monako, s-ron Derks. La Komitato nun konsistas el 49 komitatanoj A, 6 B, 14 C kaj 4 observantoj.

(4) Estraro: Okazis plenaj estrarkunsidoj en aprilo kaj aŭgusto 1975 kaj en januaro kaj aprilo 1976.

(5) Konstantaj komisionoj: La Estraro decidis provizore ne starigi la antaŭviditan komisionon pri turismo. El la Internacia Jaro de la Virino naskiĝis nova komisiono pri virina agado, kaj krome la Komitato starigis novan Konsultan Komisionon pri Edukado.

(6) Landaj kaj fakaj asocioj: La malfondo de Korea Esperanto-Societo kaj la aliĝoj de Islanda Esperanto-Asocio kaj Luksemburga Esperanto-Asocio ŝanĝis la nombron de aliĝintaj landaj asocioj al 34. Krome aliĝis Universala Medicina Esperanto-Asocio, tiel ke estas nun 3 aliĝintaj fakaj asocioj. Post Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj kaj Bahaa Esperanto-Ligo ankaŭ Rotaria Asocio de Esperantistoj subskribis kontrakton de kunlaboro kun UEA, tiel ke UEA havas nun 19 kunlaborantajn fakajn kaj neneŭtralajn asociojn.

3. ADMINISTRADO

(1) Oficistoj: La nombro de kompletaj salajritaj labortagoj en 1975 en la Centra Oficejo estis 2058 (inkluzive de purigistinoj), t.e. ekvivalento de 7,9 konstantaj dungitoj. Tio estas jam tri malpli, ol en 1974, kaj la plej malalta nombro almenaŭ de la lastaj 14 jaroj. Je la 1-a de aprilo 1976 la nombro estis plue reduktita je unu.

(2) Volontula Servo: En 1975 estis fondita la Volontula Servo de UEA kun la celo organizi volontulan, t.e. sensalajran helpon al la Centra Oficejo sed ankaŭ al aliaj instancoj de la Esperanto-movado, kiuj povas efike utiligi tian helpon. La servo estas provizore organizata el la Centra Oficejo. Detala priskribo aperis en *Esperanto* 1975 novembro, p. 181-183. Precipe la libroservo de UEA funkciadis en la lasta jaro ĉefe dank' al serio da volontuloj: s-ro T. Boersma (Nederlando), ges-roj Philip (Kanado), s-ro L. Lázaro (Portugalujo) kaj s-ro B. Crisp (Kanado).

En la C.O. helpis ankaŭ s-ino S. Kuzume (Japanujo), s-ro A.W. Treurniet (Nederlando) kaj f-ino A. Orsolini (Belgujo), dum s-ino C.A. v.d. Krans (Nederlando) kaj s-ro D.J.F. Quirke (Britujo) plenumis hejme taskojn antaŭe faritajn en la C.O. S-roj R. Slot (Nederlando) kaj J. Gowing (Britujo) donis valoran

helpo per kontrolado de presprovaĵoj, s-ro I. Jackson en Britujo efike subtenis la laboron de la prezidanto, kaj s-ro M. Christoffersen (Danlando) oferis unumonan libertempon por fake konsili pri la labormetodoj en la C.O. En aprilo 1976 eklaboris tie nova volontulo el Nov-Zelando, s-ro S. MacGill. En Antverpeno eklaboris sub gvido de P. Peeraerts grupo de junaj volontuloj, kiuj malmultekoste produktas tajlaboron por UEA. Krome sin anoncis pluraj aliaj kandidatoj por la Volontula Servo, kies helpo estos poste utiligita laŭ la eblecoj.

(3) Domo: En 1976 komenciĝis tapetado kaj interna refarbado de la domo de UEA en Rotterdam, kio estis jam urĝe necesa.

(4) Maŝinoj kaj mebloj: En marto 1976 UEA aĉetis brokante duan kompostmaŝinon kaj disponigis unu al la antverpena grupo de volontuloj por pli bone utiligilan helpo.

(5) Membraro: La finaj ciferoj pri 1975 estis: Asociaj membroj 26 008; Individuaj membroj: 648 MJ, 3 968 MA, 123 MSZ, 991 DM, 15 HM, 5 HP, 49 J-MJ, 122 J-MA, 104 MA-K, t.e. entute 6 025 individuaj membroj (en 1974: 6 543). La sumo de ĉiuj membroj estis do 32 033 (en 1974: 32 433).

(6) Periodaĵoj: La *Jarlibro* 1975 ampleksis 400 paĝojn kaj aperis en unu volumo la 18-an de junio kun eldonkvanto de 7 300 ekzempleroj. Pro la neceso ŝpari estis ellasita el ĝi la librolisto kaj la estrara raporto, kiu estis distribuita nur al komitatanoj, kongresanoj kaj aliaj petintoj.

De la revuo *Esperanto* aperis kiel kutime 11 numeroj, kvankam — same pro ŝparo — la du lastaj numeroj estis ekspeditaj kune. Bedaŭrinde la malfruo de la apero pligrandiĝis: la meza aperdato estis la 26-a de la koncerna monato. La meza eldonkvanto estis 7 650 ekz. Krom 148 simplaj abonantoj estis ankaŭ 492 kolektivaj abonoj en Belgujo kaj Hungarujo, al kiuj aldoniĝis ekde januaro 1976 pliaj 1 036 kolektivaj abonoj en Pollando.

La revuo de TEJO *Kontakto* suferis longan eldonhalton pro redakciaj problemoj. La lasta numero de 1974 aperis en januaro 1976, kune kun la duobla numero 1-2 de 1975. La ceteraj numeroj de 1975 estis kompostitaj en la komenco de 1976, tiel ke la aperado havas ŝancon rapide ĝisdatiĝi. La eldonkvanto estis 1 000, kaj la nombro de simplaj abonantoj (krom 224 individuaj membroj de TEJO) por 1975 estis 213, t.e. entute 437 pagitaj ekzempleroj.

En 1976 aperis la unuaj numeroj en la novaj serioj *Esperanto-dokumentoj* (en Esperanto) kaj *Esperanto Documents* (en la angla). Tiuj dokumentoj, kiuj anstataŭas la antaŭajn dokumentojn de CED, estas aboneblaj. La prezo estas 25,— gld. por 10 sinsekvaj dokumentoj en unu lingvo. La abonintoj de la dokumentoj de CED en 1974-75 ricevis senpage la unuajn 3 dokumentojn en la novaj serioj. Eldonkvanto: 500. La aperado ne estas ligita al difinita periodeco.

(7) Eldona fako: Pro la grandaj investoj en *Esperanto en perspektivo*, ne aperis novaj eldonaĵoj de UEA en la pasinta laborjaro, sed en januaro 1976 la Estraro nomis d-ron Ulrich Lins (FRG) komisiito pri eldona agado kun la tasko prepari perspektivan planon por la eldona fako de UEA. Plurpaĝa baza superrigardo de tiu kampo jam estas preta.

(8) Libroservo: Malgraŭ ke ĝi grandparte dependis de volontulaj helpantoj kaj ke en 1975 ne aperis nova librolisto, la vendoj en 1975 multe superis tiujn de 1974. Tio ŝuldiĝis al la vendado de *Esperanto en Perspektivo*: post subtraho de ĝiaj enspezoj, la ceteraj vendoj malmulte diferencas inter tiuj du jaroj. Pro la temporaba karaktero de malgrandaj mendoj kaj ankaŭ pro la altiĝo de la afranktarifoj, en septembro 1975 la libroservo enkondukis minimuman sumon por la sendokostoj (3,— gld.), apud la jam ekzistanta minimumo por la neta mendosumo (15,— gld.).

(9) Abonservo: Ĝi estis plue administrata en la C.O., sed estas esplorataj la eblecoj por plenumi tiun temporaban kaj nete deficitan servon per volontulaj fortoj.

(10) Grafikaj laboroj: Pro la manko de tuttempa kompostisto la laboro sur tiu kampo estis severe limigita. Krom la propraj eldonaĵoj, la C.O. prilaboris grafike presaĵojn por la Universalaj Kongresoj, por ILEI, por la flugkompanio JAT, por eldonejo en FR Germanujo kaj por kelkaj entreprenoj en Rotterdam.

(11) Biblioteko: La daŭre kreskanta kolekto de Biblioteko Hodler komencis okupi, krom la ĉambroj Kanado kaj Saft, ankaŭ la ĉambron Aŭstralio, kiu en 1975 ne plu servis kiel loĝoĉambro. Inter pluraj studvizitoj estas menciinda tiu de P.G. Forster (Britujo), por kiu li ricevis stipendion de *British Council*. En oktobro 1975 la biblioteko ricevis grandegan donacon: jarkolektoj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-periodaĵoj de post la Unua Monda Milito, kiujn transdonis al ĝi s-ro Teo Jung en Hago. Aliajn gravajn donacojn lastatempe faris s-roj de Goeij, van Ingen kaj Veenstra (ĉiuj Nederlando).

(12) Varbado: Krom rutina varbado ĉe landaj kaj aliaj kongresoj, la ĉefa iniciato estis la lanĉo de speciala konkurso por membro-varbado, kun allogaj premioj donacitaj de Internacia Esperanto-Instituto. La konkurso daŭras ĝis la fino de aprilo 1976. Komence de 1976 estis farita plia kampanjo por revarbo de malnovaj membroj, eksperimente nur en kelkaj landoj: Nederlando, Danlando, Svedujo, Finnlando kaj Norvegujo. Pro la relative bonaj rezultoj, ĝi estis poste etendita ankaŭ al Britujo kaj Francujo.

(13) Landaj oficejoj: La ĉefdelegito por Belgujo, f-ino A. Orsolini, oficiale ekfunkciis ankaŭ kiel kotizperanto por Luksemburgo. En Israelo s-ro A. Kuppermann transprenis la oficon de peranto de s-ro Israeli, kiu demisiis pro malsano, kaj en Norvegujo estis nomita nova ĉefdelegito, s-ro K. Gustavsen, pro la forpaso de s-ro A. Skyberg. Forpasis ankaŭ la peranto por Turkujo, s-ro H. Kocaman.

(14) Serva Centro: Ankoraŭ ĉe s-ro J.J. Sturzenegger en Zürich.

(15) Societo Zamenhof: La aparta societo fondita en 1974 por tiuj, kiuj deziras finance subteni la Asocion, montriĝis tre sukcesa iniciato. Kvankam la membrolisto (vidu la alineon 5) montras nur 123 MSZ (t.e. personoj, kiuj pagis trioblan kotizon de MA), efektive aliĝis al la Societo ankaŭ multaj aliaj, kiuj jam estis individuaj membroj de UEA en alia kategorio. En 1975 Societo Zamenhof nombris entute 172 membrojn.

(16) Poŝtmarkvendado: En januaro 1976 la Estraro nomis novan komisiiton pri la kampanjo por kolektado kaj vendado de uzitaj poŝtmarkoj favore al la kaso de UEA. Li estas s-ro I. Paulsson (Svedujo). La membroj estas petataj daŭrigi la kampanjon, sendante uzitajn poŝtmarkojn al la C.O. en Rotterdam.

4. FINANCOJ

A. FINANCA PROGRAMO

(1) Ekesto: La 26-an de julio 1975, dum siaj kunsidoj en Kopenhago, la Komitato unuanime akceptis proponon 'ke estu lanĉita financa programo de la Esperanto-movado'. Ĝi komisiis al la estraro 'elabori detalojn de la agado kunlige kun la programo, havigi la helpon de la bezonataj spertuloj kaj konsilantoj kaj komenci la plenumon de la programo'.

(2) Celo: La ideo pri Financa Programo fontis el la konstato, ke, eĉ se la Asocio sukcesos solvi siajn tujajn financajn problemojn kaj ekvilibrigi kostojn kaj rimedojn, ĝi ne disponas la necesajn financajn rimedojn kaj ne posedas la necesan financon nivelon por havi vere decidan kaj efikan influon al la progreso de Esperanto. El tiu konstato sekvis plia konstato, nome ke problemoj similaj al tiuj de UEA alfrontas fakte la tutan Esperanto-movadon, kaj ke komuna klopodo ŝanĝi tiun situacion estas nepre necesa. La financa programo do celas ŝanĝi la financon bazan strukturon de la Esperanto-movado.

(3) Metodoj: La programo celas sisteme elserĉi subvenciojn kaj donacojn, per kiuj ni financu la ĝeneralan agadon por Esperanto aŭ por specifaj kampanjoj aŭ esploroj. Tiuj financaj rimedoj venu unuavice de privatuloj, fondaĵoj, ŝtataj instancoj, komerco kaj industrio. La projektoj, por kiuj oni serĉos rimedojn, estos projektoj ne nur de UEA, sed de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kunlaborantaj en la Programo. Kvankam la ĉefa celo de la Programo estas spili ekstermovadajn

fontojn de rimedoj, ĝi ankaŭ sisteme varbos donacojn interne de la Esperanto-movado.

(4) Gvidado: La Programo estas bazita sur principoj aplikataj de multaj grandaj movadoj kaj organizaĵoj similaj al la nia — kvankam ĝi estas io nova en la Esperanto-movado. Gvidas ĝin la prezidanto de la Asocio en konsulto kun la estrarano pri financoj.

(5) Ĝisnuna progreso: Pluraj landaj asocioj anoncis sian intencon kunlabori en la Programo. Rapide antaŭeniras la preparado de taŭgaj informmaterialoj kaj la komencaj esploroj. Kolektiĝis ĝis nun entute 59 600 guldenoj en kvin donacoj. F-ino Betty Salt (Kanado) donacis 5 500 guldenojn por la disvastigo de Esperanto en la Skolta Movado, kaj tiu sumo jam financas projekton de la Skolta Esperanto-Ligo, prezentitan al UEA en septembro 1975. De la Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), UEA ricevis donacon de 6 000 guldenoj, dum dua sumo de 430 guldenoj alfluis la Programon pere de EKI, dank' al donaco de iama kunlaborinto de la Instituto. De la fondaĵo Levi-Lassen (Nederlando) estis ricevita sumo de 5 000 guldenoj kaj de anonima donacinto 42 700 guldenoj, ĉefe en formo de investita kapitalo.


B. KONTO DE KOSTOJ KAJ ENSPEZOJ EN 1975

(1) Buĝeto kaj fina rezulto: En sia Cirk.Let. de 74 08 11 al la Komitato, la prezidanto de UEA prezentis la reviziitan buĝetproponon por la jaro 1975. Ĝi saldiĝis per antaŭvidita deficito de 12 200 guldenoj.

Pro faritaj ŝparoj, tranĉoj en la ĝenerala mastrumado de la Asocio kaj kelkaj neatenditaj avantaĝoj, la jaro 1975 finiĝis ne nur sen deficito, sed — post rezervigo de 20 000 guldenoj por urĝe necesaj riparoj al la domo de UEA — kun profito de 26 000 guldenoj (ĉiuj ciferoj rondigitaj je mil guldenoj).

La ero 'Salajroj' estis, je la fino de la jaro, 30 000 gld. malpli ol buĝetite; la kostoj de la revuo *Esperanto* estis 7 000 gld. malpli. La jenaj enspezoj superis la

370 000 GLD.



GRAFIKAĴO PRI LA EVOLUO
dum la periodo 1965-1975 de la
Asocia Kapitalo •••
Kapitalo plus Fondaĵoj ★★★
Elspezoj de UEA ■■■

buĝetitajn sumojn: donacoj 13 000 gld. (buĝetite 2 000 gld.), libroservo 63 000 gld. (buĝetite 37 000 gld.). Iom malpli favora ol la buĝetita sumo estis la enspezo el kotizoj, kiuj lastaj estis efektive 254 000 gld. kontraŭ 261 000 buĝetite. Ĉiuj aliaj kostoj aŭ rimedoj estis preskaŭ laŭ la buĝetitaj sumoj aŭ iom pli aŭ malpli favoraj.

(2) **Salajroj:** Estas ja facile diri, ke UEA 'ŝparis' 30 000 gld. je salajroj, sed tio signifas plian reduktiĝon de la nombro de geoficistoj en la C.O. Volontuloj povis nur parte anstataŭi la foririntajn oficistojn en la jaro 1975. Krome la salajroj de kelkaj oficistoj ne estis altigitaj laŭ la normoj kutimaj en Nederlando.

(3) **Revuo 'Esperanto':** La buĝeto 1975 antaŭvidis aperigon de nur 10 numeroj. Tamen aperis la plena jarkolekto de 11 numeroj. Ke malgraŭ tio la kostoj de la revuo restis je 7 000 gld. sub la buĝetita sumo grandparte (por 5 000 gld.) dankindas al la pli grandaj enspezoj el anoncoj.

(4) **Vojaĝ- kaj restad-kostoj:** Ili estis pli altaj ol buĝetite pro vojaĝoj de la direktoro kaj vicedirektoro en ligo kun la okazontaj U.K.j kaj pro la fakto, ke okazis 2 kunsidoj de la Estraro en Rotterdam, kiujn ĉeestis ĉiuj estraranoj. Aldoniĝis al tiu ĉi buĝetero la vojaĝ- kaj restad-kostoj de volontuloj, origine ne buĝetitaj. Ĉio ĉi kaŭzis elspezojn de 5 000 gld. pli ol buĝetite.

(5) **Diversaĵoj:** Neantaŭvideblaj perdoj je kurzo-diferencoj estas la ĉefa kaŭzo de la buĝeta deficitado de ĉ. 3 000 gld. sub tiu ĉi rubriko.

(6) **Kotizoj:** Enspezoj el kotizoj restis je 7 000 gld. sub la buĝeto. Falo de la nombro de individuaj membroj kaŭzis ĝin. Estas konata fenomeno, ke ĉiu plialtigo de la kotizoj perdigas al UEA membrojn. Tiurilate ŝajnas utile atentigi pri tio, ke en la jaro 1973 la kotizo de MA estis 30 gld., ke ĝi fariĝis 40 gld. por la jaro 1974 kaj 50 gld. ekde la jaro 1975. Sekve ĝi kreskis, en guldenoj, je 67 procentoj en 2 jaroj.

La Estraro ne intencas plialtigi la kotizojn por la jaro 1977.

(7) **Donacoj:** Kiam la Asocio troviĝis en gravaj financaj malfacilaĵoj, mirinda estis la malavara reago de multaj membroj. Ordinare UEA ricevas ĉiujare donacojn por ĝeneralaj celoj de kelkaj miloj da guldenoj. Ekde la dua semestro de la jaro 1974 envenis multaj donacoj por la ĝenerala kaso, kaj dum la jaro 1975 ilia sumo atingis 13 000 gld. La Estraro esprimas sian tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj.

(8) **Libroservo:** Por ebligi la eldonon de la verko *Esperanto en Perspektivo*, UEA devis riski investon de 84 000 gld., sed ĝis la fino de 1975 vendiĝis pli ol 1 000 ekzempleroj. Tiel la vendosumo de la libroservo atingis 162 000 gld. en 1975 kun (malneta) profito de 63 000 gld., pli granda ol iam antaŭe.

C. BILANCO JE 31-A DE DECEMBRO 1975

(1) **Monrimedoj:** Dank' al la profito (26 000 gld.) kaj la reduktiĝo de la librostoko kaj kelkaj aliaj provizoj, la monrimedoj de la Asocio je la fino de la jaro 1975 superis tiujn de la antaŭa jaro per 42 000 gld. (84 000 kontraŭ 42 000 pasintjare).

(2) **Valorpaperoj:** Post la falo en antaŭaj jaroj, la kurzoj de la valorpaperoj releviĝis, tiel ke je la lasta tago de la jaro 1975 ili plivaloriĝis per 9 000 gld.

(3) **Debitoroj:** La saldo de la debitoroj kreskis en la daŭro de 1975 per 30 000 gld. ĝis entute 156 000 gld. Tio estas fonto de konstanta zorgo, kaj ĉi-loke la Estraro denove apelacias al ĉiuj, kiuj ŝuldas monon al UEA, ke ili faru ĉion eblan por transpagi la ŝuldatajn sumojn laŭeble baldaŭ. La decido de la Komitato postuli renton de prokrastintaj debitoroj espereble instigos multajn al pli rapida pago.

(4) **Provizoj:** La tuto de la provizoj malkreskis per 41 000 gld. dum la jaro 1975 (189 000 kontraŭ 230 000 pasintjare).

(5) **Inventaro:** La malplivaloriĝon kaŭzis nur la aplikitaj deprezoj.

(6) **Kreditoroj:** La tuta sumo de la kreditoroj malkreskis per 40 000 gld. (146 000 kontraŭ 186 000 pasintjare).

(7) **Fondaĵoj:** La sumo de ĉiuj fondaĵoj por specialaj celoj kreskis per 27 000 gld. (57 000 kontraŭ 30 000 pasintjare). La propaganda konto kreskis per ĉ. 17 000 gld. Sumo de 18 000 gld. venis en la propagandan konton kiel rezulto de la 60-a UK en Kopenhago, kaj la elspezoj el tiu konto estis nur malgrandaj dum la jaro 1975. La Financa Programo de la Esperanto-movado aldonis sumon de pli ol 5 000 gld., la konto CED kreskis per pli ol 2 600 gld., dum la Kongresa Rezerva Fondaĵo kreskis per ĉ. 2 000 gld.

(8) **Dumvivaj membroj:** La kapitalo DM kreskis dum la jaro per sumo de 17 000 gld., pro la registriĝo de 13 novaj Dumvivaj Membroj, pro la kurzogajno je la valorpaperoj (kiuj ja apartenas al la konto DM) kaj, je la negativa flanko, pro kelkaj negrandaj elspezoj.

(9) **Cetera kapitalo:** Pro la deficitado en antaŭaj jaroj, la sumo de la cetera kapitalo daŭre malaltiĝis, ĝis fine restis nur iom malpli ol 9 000 gld. Pro kelkaj ricevitaj heredaĵoj kaj donacoj ĝi kreskis dum la jaro 1975 al pli ol 11 000 gld., al kiu sumo nun aldoniĝas la profito de la jaro 1975 de 26 000 gld., tiel ke la 'cetera kapitalo' fine de 1975 sumiĝas je preskaŭ 38 000 gld.

(10) **Resume:** Je la fino de la jaro 1974, la sumo de la Fondaĵoj kaj Asocia Kapitalo kune estis 275 000 gld., kaj je la fino de la jaro 1975 ĝi estis 347 000 gld., tiel ke, en la daŭro de unu jaro, la tuta kapitalo (Asocia kapitalo plus fondaĵoj) kreskis per 72 000 gld. (26 procentoj).

Ĉ. FINA RIMARKO

La esperiga starto de la Financa Programo kaj la kontentiga financa rezulto de la jaro 1975 montras, ke el financa vidpunkto UEA estas sur la bona vojo. Ni tamen volas averti, ke oni ne tro frue ĝojkriu, ĉar la financa restabiliĝo estis realigebla grandparte per tranĉoj kaj ŝparoj, kiuj nepre devis redukti la pagatajn laborfortojn en la C.O. kaj sekve la servojn, kiujn oni rajtas atendi de UEA. La peza taskaro efike kaj taŭge prezenti la Internacian Lingvon al la mondo, venki la barojn kaj antaŭjuĝojn, kuŝas ankoraŭ antaŭ ni. Por efektivigi tiun grandan laboron, UEA bezonas kaj homajn fortojn kaj monon.

5. INSTITUCIO HODLER '68

En la jaro 1975 la konsisto de la estraro de tiu ĉi institucio restis kiel antaŭe: s-ro G. Maertens, Belgio, prezidanto, d-ro W. Bormann, FRG kaj s-ro E. HaverSchmidt, Nederlando, estraranoj. F-ino M.H. Vermaas, Nederlando, plue funkciis kiel administranto.

La jarkunveno okazis la 3-an de majo 1975 en Markelo (Nederlando). La estraro tiam decidis pri asigno de subvencioj el sumo de 6 700 gld., disponigante ilin jene: Fondaĵo prof. Canuto 2 300 gld. por membrigi al UEA personojn, precipe en landoj de la t.n. 'tria mondo', praktike sen organizita movado; Akademio de Esperanto 1 500 gld. por helpi la eldonon de la dua kajero de 'Aktoj de la Akademio'; Eldonejo Stafeto 800 gld. por helpi en la finpreparo de la prestiĝa verko 'La Luzidoj'; Portugala Esperanto-Asocio 600 gld. por ebligi al tiu reviviĝanta asocio plue eldoni sian organon; Kultura Esperanto-Domo Kastelo Grésillon 500 gld. por helpi la renovigon de la granda prelegsalono; Skolta Esperantista Ligo 500 gld. por helpi ĝian gravan laboron en la kadro de la ĵamboreo; Eŭropa Esperanto-Centro 500 gld. por helpi la eldonon de plurlingva informilo pri Esperanto-instruado.

Dum la jaro alvenis pliaj pruntoj kaj donacoj, i.a. tre bela el Greklando. Aliflanke, pro la fakto ke post fondo de la Institucio fine de 1968 multaj pruntoj alvenis en 1969, en la nuna jaro nombro da 6-jaraj pruntoj (senrentaj) estis repagendaj. Al la koncernaj personoj estis sendita cirkulera letero kun respondilo. Pere de ĝi sufiĉe multaj pruntintoj esprimis la deziron daŭrigi la pruntan por plia 6-jara periodo aŭ eĉ transformis ĝin al donaco, dum aliaj, kompreneble, bezonis la monon kaj petis repagon de la pruntita sumo. En 1975 alvenis en la konton de I.H.68 ankaŭ la heredaĵo Steffering je 7 801,03 gld., anoncita jam lastjare. Plie, kompletigis per partopagoj la kapitalo de unu miliono da italaj liroj, kies rento estas destinita por 'premio Luigi Minnaja' en nova branĉo de la Belartaj Konkursoj. Unuan fojon tiu premio estos disponigita en 1976. La familio Minnaja meritas grandan dankon pro tiu bela iniciato. La kapitalo Hodler '68 estas, kiel antaŭe, investita en akcioj, obligacioj, hipoteke kaj loĝodomo, ĉio laŭ decido de la estraro kaj surbaze de la statuto.

6. REVUO

(1) **Redakcio:** Dum la tuta jaro 1975 funkciis s-ro Simo Milojević kiel redaktoro de la revuo 'Esperanto'. Pro la reduktiĝo de la oficistaro en la C.O. la redakto-ro estis devigita plejgrandparte okupiĝi ankaŭ pri aliaj taskoj en ligo kun la teknika prizorgo de la revuo (kompostado, grafikaj laboroj, enpaĝigo, kontrolo de presprovaĵoj, k.s.). Tio kaŭzis bedaŭrindan malfru-igon en la aperritmo de la revuo. Dum sia lasta kunsido en aprilo 1976, la Estraro pridiskutis tiun problemon kaj faris la necesajn decidojn, por ke plej malfrue ĝis la Atena UK la normala eldonritmo estu regajnta.

(2) **Amplekso kaj enhavo:** La amplekso de la jar-kolekto 1975 estis entute 264 paĝoj, same kiel en la antaŭaj jaroj. Pagitaj anoncoj okupis iom pli ol 16 paĝoj. Novaĵo estis la apero de unu numero (la decembra) aparte dediĉita al la beletro.

(3) **Teknika prizorgo:** La revuon plejparte kompostis la redaktoro mem pro la reduktado de la nombro de oficistoj. Por la decembra numero kompostis ankaŭ la firmo Nevan (Rotterdam).

7. KONGRESOJ

(1) **60-a UK en Kopenhago, Danlando:** La 60-a (jubilea) Universala Kongreso de Esperanto okazis en la dana ĉefurbo Kopenhago, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975, sub la alta protektado de la Ĉefministro de Danlando, s-ro Anker Jørgensen. Partoprenis la kongreson 1 227 kongresanoj el 53 landoj. La Honora Komitato konsistis el 13 membroj, inter kiuj la Prezidanto de la Dana Parlamento, du Ministroj, la ĉefurbestro de Kopenhago kaj aliaj konataj altranguloj el la dana publika vivo.

La kongreson prezidis d-ro Humphrey R. Tonkin, prezidanto de UEA. Prezidanto de la LKK estis s-ro Gustav Kühlmann. Ĉiuj aranĝoj de la kongreso okazis en la moderna kongrescentro 'Falkoner Centret' kaj en la apuda lernejo.

La inaŭguro okazis, por la unua fojo, en du partoj: antaŭtagmeze la oficiala inaŭguro, en kiu reprezentigis diplomatoj el 22 ŝtatoj. Posttagmeze okazis la malfermo de la kongreso, sen ĉeesto de ne-esperantista publiko. Prezidis ĝin d-ro W. Bormann, vicprezidanto de UEA. La prezidanto, d-ro H. Tonkin, faris analizan prelegon pri la laboro farita dum la pasinta jaro kaj pri la celoj kaj planoj de UEA.

En la Unua Ĝenerala Kunsido de UEA, prezidita de d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, estis pritraktita, kiel kutime, la Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1974/75.

La Dua Ĝenerala Kunsido estis dediĉita al la kongresa ĉeftemo: 'La socia pozicio de la virino'. Prezidis d-rino F. Szabó-Felső. En la kadro de la 28-a sesio de la Internacia Somera Universitato okazis 8 prelegoj, kiuj kovris diversajn terenojn de lingvistiko, literaturo, naturscienco, komputora edukado kaj virinaj agadoj en ekonomio kaj scienc-teknika progreso. En ligo kun I.S.U. estis enkondukitaj por la unua fojo t.n. seminarioj, kiuj donis la eblecon pridiskuti, en mal-grandaj grupoj, temojn pritraktitajn en I.S.U. — prelegoj sub gvidado de la koncerna profesoro. La Rektoro de I.S.U. estis d-ro Paul Neergaard.

Al la novaj aranĝoj de la 60a UK apartenis ankaŭ la rondtabla diskutkunveno, kiu ĉe pluraj tabloj traktis apartajn aspektojn de la movada ĉeftemo de la Kongreso "La rolo de la individuo en la Esperanto-movado". La ofte viglaj diskutoj naskis plurajn interesajn proponojn, utiligeblajn por la gvidorganoj de UEA.

La jubilea 25a okazigo de la Belartaj Konkursoj havis en Kopenhago apartan solenaĵon en kiu d-ro Humphrey Tonkin parolis pri la Esperanta kulturo, kaj s-ro Baldur Ragnarsson tre detale raportis pri la rezultoj de la 25a okazigo (v. en la revuo *Esperanto*, sept. 1975, p.149). Pluraj ĉeestantaj aŭtoroj legis siajn premiitajn konkursojn, dum la brita muzikista paro Margaret kaj David Hill kontribuis per du kantoj. Pri la Belartaj Konkursoj v. ankaŭ la ĉapitron 10 B (2).

Dum la UK okazis cento da laboraj aranĝoj, el kiuj pli ol 30 estis kunvenoj de fakaj asocioj.

La 60-a UK prezentis al la kongresanoj vere riĉenhavan programon, ankaŭ rilate al la artaj aranĝoj. Aparte menciinda estas la spektaklo de Bulgara Esperanto-Teatro, kiu prezentis verkon de Goldoni: 'Servisto de du mastroj'. Brila estis la prezentado de Jadwiga Gibczyńska dum la Dana Vespero. Ĝuinda estis ankaŭ la Internacia Arta Vespero, precipe la programo de la svisa muzikistino Danielle Béguin.

La komitato de UEA kunsidis sepfoje en Kopenhago kaj laboris nekutime efike en granda harmonio. La efikeco de la kunsidoj parte dankindas al la nova teknika strukturo de la kunsidoj laŭ antaŭe akceptita procedura regularo.

Dum la UK oni akceptis kvar rezoluciojn: rezolucio de la Komitato de UEA pri politika neŭtraleco, kongresa rezolucio pri la rolo de la individuo en la Movado, rezolucio de la Komitato de UEA al la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro, sendita al Helsinko, kaj kongresa rezolucio okaze de la Internacia Jaro de la Virino. Por la detalaj tekstoj de la rezolucioj oni konsultu la revuon *Esperanto*, septembro 1975.

La Estraro de UEA havis 7 kunsidojn, kiujn partoprenis krom la direktoro kaj vicedirektoro de la C.O. parte ankaŭ invititaj estraranoj de TEJO, reprezentantoj de la Atena LKK k.a.

Ĉiuj kongresanoj ricevis inter siaj kongresdokumentoj detalan enketilon pri la Universalaj Kongresoj kun specifaj demandoj pri la 60-a en Kopenhago. Plenis kaj resendis ĝin ĉ. 250 personoj. Profunda analizo de la respondoj, sugestoj, rekomendoj, deziroj kaj kritikoj havigas al la kongresorganizantoj tre valoran materialon por daŭre plibonigi, renovigi kaj rearanĝi estontajn kongresojn. La analizoj aperis kaj ankoraŭ aperos en la revuo *Esperanto*.

Speciale oni devas mencii – kaj multegaj kongresanoj emfazis tion, ankaŭ en la resenditaj enketiloj – ke dum la tuta daŭro de la Kopenhaga kongreso regis korvarmiga etoso de plena harmonio, de kunlaboremo kaj de reciproka komprenemo.

(2) Aranĝoj en ligo kun la 60-a UK: Inter la 20-a kaj la 26-a de julio 1975 okazis en Hillerød, Danlando, kun partopreno de 64 personoj el 11 landoj, la 43-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj. La kongreso akceptis tri rezoluciojn, el kiuj la unua koncernas la integran edukadon, la dua informadon de la ĝenerala publiko pri la socia pozicio de la blinduloj, kaj la tria pledas por diskonigo de la spertoj en skandinaviaj landoj, kie la poŝto kaj bankoj uzas brajlan skribon por administri la kontojn de siaj blindaj klientoj.

La 15-a Internacia Infana Kongreseto okazis paralele kun la 60-a UK, en Hellerup, Danlando, en la sama loko, kie la 1-a Infana Kongreseto okazis en la jaro 1956. Partoprenis la Kongreseton ĉi-jare 25 infanoj el 8 landoj.

(3) TEJO-Kongreso: La 31-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis de la 19-a ĝis la 26-a de julio 1975 en Fredericia, Danlando, kaj ĝin ĉeestis 265 partoprenantoj. Por pliaj detaloj vidu la ĉapitron 11 de tiu ĉi Raporto.

(4) UK en Ateno (Greklando): Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 61-a UK de Esperanto okazos en la greka ĉefurbo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1976. Prezidanto de la LKK estas s-ro G. Miggas.

(5) UK en Rejkjaviko (Islando): La Estraro decidis okazigi la 62-an UK de Esperanto en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko. Ĝi jam aprobis la konsiston de la LKK, kiu estas sub la prezidanteco de s-ro Baldur Ragnarsson.

(6) UK en Varna (Bulgario): En la jaro 1978, laŭ la invito de Bulgara Esperanto-Asocio, la 63-a UK de Esperanto okazos en la universitata urbo Varna, ĉe la Nigra Maro. Tiun decidon faris la Estraro de UEA dum sia kunsido en Rotterdam, en januaro 1976.

8. INFORMADO

NOTO: Ĉar la ĉapitro pri informado mankis en la pasintjara Raporto de la Estraro, en la ĉi-suba raporto pri 1975-76 estas kelkloke tuŝitaj ankaŭ gravaj punktoj pri la laborjaro 1974-75.

(1) Ĝeneralaj informoj: Dum la 59-a UK en Hamburgo la Komitato de UEA starigis Komisionon pri Informado, al kiu estis elektitaj kiel membroj s-roj T. Boersma, F. Luin, L. Kosieniak kaj A. Pettyn. S-ro Ŝwistak, estrarano de UEA, estis komisiita de la Estraro gvidi la ĝeneralan informan agadon.

Tre efike laboris, pere de Pola Radio, s-ro A. Pettyn, donante regule novajn instigojn al la ĝenerala informado pri Esperanto. La prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, dum la monatoj septembro kaj oktobro 1975 faris prelegvojaĝon tra Finnlando kaj aliaj skandinaviaj landoj, kiu rezultigis multajn artikolojn en la naciaj gazetaroj, radio-intervjuojn, ktp. Entute aperis pli ol 1000 kolumnaj centimetroj da raporto pri la prelegoj kaj intervjuoj.

Menciindas la bona iniciato de s-ro C. Piron, kies interveno ĉe la Monda Organizaĵo pri Sano en Ĝenevo proteste kontraŭ la elspezo de grandaj sumoj por pli-ampleksigo de la lingvaj servoj en tiu Organizaĵo (anstataŭ por efektiva saniga helpo) estis vaste raportita en la gazetararo de pluraj landoj, i.a. en Francio, Britio, Nederlando, Svedio, Belgio, Svislando kaj Jugoslavio.

En kelkaj landoj, ne-esperantistaj gazetoj aperigis regulajn rubrikojn en aŭ pri Esperanto; inter ili speciale menciindas *Sovetskaja Molodeŝ* (Sovetunio) kaj *ZET* (Jugoslavio).

Aparte substrekindas la laboro de s-ro L. Pickel (Pilo-Press). Multaj gazetartikoloj pravas, ke la servo Pilo-Press estas vaste utiligata kiel konstanta fonto de freŝdataj novaĵoj. Alia valora informanto en FRG estas la Esperanto-Centro Paderborn (Behrmann). Regule aperas informiloj en germana lingvo sub titolo 'Esperanto-Nachrichten-Dienst', kiuj estas sendataj al radio, televido, gazetararo, informservoj, unuopaj interesigantoj kaj oficialaj instancoj.

La prelegvojaĝo de ges-roj Grattapaglia pri 'Bona Espero' en Brazilo, kiun ili faris post la Kopenhaga UK, trovis vastan reeĥon en la gazetararo. En Nederlando estis starigita, en la kadro de Internacia Esperanto-Instituto, la Esperanto-Centro Nederlando, kies celo estas regule havigi informojn, ne nur al la lokaj grupoj, sed al plej diversaj instancoj, aŭtoritatuloj, nacia gazetararo, ktp.

En 1976 komencis aperi nova serio de dokumentoj pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado, sub la

titolo 'Esperanto-Dokumentoj'. La dokumentojn eldonas UEA mem, kaj ili anstataŭas tiujn, kiujn eldonis CED ekde 1951 ĝis 1974. Ĉiu unuopa dokumento enhavas referencon pri difinita ĉapitro en la verko 'Esperanto en Perspektivo', al kiu ĝi proksime rilatas, tiel ke la nova serio kvazaŭ konstante suplementas la informmaterialon en tiu grava manlibro.

(2) Landaj Informaj Fakoj: La agadon de la Landaj Informaj Fakoj ni povas juĝi nur laŭ alvenintaj raportoj kaj publikigitaj rezultoj en la Esperanto-gazetaro. La raportoj pruvas, ke ĝenerale oni daŭrigas agadojn, kiuj montriĝis promesplenaj dum la lasta laborperiodo, sed ankaŭ notindas novaj sukcesoj kaj iniciatoj. Jen mallongaj, sed sufiĉe gravaj sciindaĵoj:

Britio: La Informa Fakoj (IF) de Brita Esperanto-Asocio daŭrigas la eldonon de 'Esperanto-News', utiligas vastskale la broŝuron de Mario Pei 'Wanted a World Language' kaj ankaŭ 'A First Foreign Language'. Dum la lastaj 3 jaroj pligrandiĝis la nombro de gazetartikoloj pri Esperanto (ekzemple, en 1972 aperis 269 artikoloj kaj en 1975 ĉirkaŭ 785). En 1974 okazis 10 radio-intervjuoj pri Esperanto kaj en 1975 estis 36 (plus 7 televidaj mencioj aŭ intervjuoj). BEA ankaŭ funkciigas reton de korespondantoj-esperantistoj, pretaj interveni ĉe redakcioj de ĵurnaloj kaj revuoj per trafaj argumentoj. Krome ĝi eldonas regule gazetarajn bultenojn.

FRG: Okaze de nacia kongreso en Oberkirch — kaj ankaŭ ĉe aliaj aranĝoj — GEA dediĉis specialan atenton al bonega organizo de gazetaraj konferencoj. En 1975 aperis proksimume 100 seriozaj artikoloj pri Esperanto, okazis inter 5 kaj 10 televidaj elsendoj kaj 10 mencioj pri Esperanto en radio. En 1975, okaze de la Internacia Jaro de la Virino, la radiostacio Hamburgo organizis interparolon kun s-ino Elsbeth Bormann pri ŝiaj laboroj sur tiu kampo enkadre de UEA. Ankaŭ la loka gazetaro detale raportis pri tiu laboro. En 1975 okazis denove kelkaj Esperanto-ekspozicioj, i.a. en Munkeno, Augsburg, Nuremburgo, Neustadt/Weinstr., Treuchtlingen kaj Weissenburg. Germana Esperanto-Junularo eldonis informbroŝuron sub la titolo: 'Wir informieren', kaj Germana Esperanta Fervojista Asocio, en kunlaboro kun GEA, eldonis la germanan tradukon de la informbroŝuro de la Itala Socialdemokrata Partio.

Bulgario: Plioftiĝis en Bulgario la nombro de radio-kaj televidelsendoj. Tri ĵurnaloj, i.a. 'Oteĉestven Front' (Sofia) publikigas konstantajn Esperanto-rubrikojn. Estis eldonita porokaza gazeto bulgarlingva 'Globus', 8-paĝa, en 20 000 ekzempleroj.

Pollando: PEA daŭrigas la dissendon de nacilingvaj bultenoj al la redakcioj de amaskomunikiloj en Pollando. Oni sukcesis plivigli la polajn ĵurnalistajn rondojn kun la rezulto, ke 6 gazetoj, inter kiuj 'Ilustrita Pola Kuriero', 'Vespera Magazino' — ambaŭ eldonataj en Bydgoszcz — 'Balta Magazino', eldonata en Gdańsk, 'Metamorfozoj', eldonata en Kielce (eldonnombro de la 4 gazetoj kune pli ol 500 000 ekzempleroj), publikigas konstantajn Esperanto-rubrikojn. Plej multe la gazetaro skribas pri korespondaj kursoj gvidataj de la ĉefestraro de PEA. Ĉirkaŭ 5 000 personoj utiligas jare tiun ĉi metodon.

La kampanjo ESPERANTO NON STOP liveras al la C.O. de PEA 20 ĝis 50 demandojn ĉiutage de unuopuloj pri Esperanto kaj la eblecoj lerni ĝin. Kiel kutime, Pola Radio raportas ĉiutage por la esperantistoj kaj informas ankaŭ nacilingve.

(3) Informa agado de la Centra Oficejo:

Nacilingvaj informpetoj la C.O. plej ofte respondas kunlabore kun la koncernaj landaj asocioj aŭ, se tia ne ekzistas en la koncerna lando, kun d-ro R. Corsetti, komisiito pri regiona agado. La C.O. plurfoje havigis senpage ekspoziciajn materialojn por landa aŭ loka agado, interalie por la monda skolta ĵamboreo en Norvegio, en aŭgusto 1975. Ĝi ankaŭ dissendis senpage lernolibrojn kaj similajn materialojn, je la ŝarĝo de la Propaganda Konto aŭ Fondaĵo Azio-Afriko, ĝis valoro de entute 942 guldenoj. Al tiu agado menciinde kontribuis GEA per donaco de 518 guldenoj kaj BEA (Britio) per donaco de 30 kompletoj de la anglalingva kurso 'Esperanto programita' de H. Behrmann. La C.O. kompilis 60-paĝan katalogon de materialoj de la Universala Ekspozicio, tiel preparante ĝian forvendon. La celo de la forvendo estas krei novan, pli modernan ekspozicion, pli facile transporteban kaj ekspedeban.

(4) Laboro de la Komisiono pri informado: En la kunsido de la Komisiono pri informado estis fiksita kaj estis poste akceptita de la Komitato minimuma agadprogramo por la laborjaro 1975-76. Laŭ ĝia programo la Komisiono jam entreprenis la analizon de la nuna stato de informado en la Landaj Asocioj de UEA, Fakaj Asocioj, TEJO kaj UEA. Ĝi okupiĝas pri daŭra renovigo de la reto de kunlaborantoj kaj sisteme ellaboras planon por pli efika informado por la jaroj 1976-1980. La plano estos prezentita en Ateno, unue al la Estraro de UEA, poste al la Komitato. Por ebligi la realigon de la diversaj taskoj, la Komitato, en sia kunsido de 2 aŭgusto 1975, aprobis pliampleksigon de la konsisto de la komisiono, kiu nun havas jenajn membrojn: s-roj T. Boersma, G. Conrad, L. Kosieniak, B. Leonov, F. Luin, H. Melasniemi, A. Pettyn kaj S. Świstak. Pluraj novaj kunlaborantoj estas kontaktataj.

(5) Informa laboro de TEJO: Vidu la raporton de TEJO (ĉapitro 11).

(6) Informado pri la Universalaj Kongresoj:

Hamburgo 1974: Antaŭ la okazigo de la kongreso jam aperis pluraj, parte tre ampleksaj, artikoloj pri la okazontaĵo, i.a. en *Süddeutsche Zeitung*, *Die Welt* kaj *Handelsblatt*. En la plej grava semajna gazeto *Die Zeit* aperis artikolo de prof. H. Frank pri la eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj.

Verŝajne senprecedence multnombraj partoprenon de entute 22 ĵurnalistoj spertis la Gazetara Konferenco je la 26 julio 1974. Dum la kongressemajno preskaŭ ĉiuj regionaj radio-stacioj en FRG disaŭdigis rektajn intervjuojn kun kongresaj funkciuloj, el kiuj 6 kun la LKK-prezidanto, d-ro W. Bormann. Li ankaŭ aperis en nordgermana t.v.-programo per 7-minuta intervjuo. Scenojn el la Inaŭguro prezentis la novaĵmagazino de la Dua Germana Televido, tutlande kaptebla. Ankaŭ eksterlande reeĥis ofte kaj pozitive la Hamburga UK. Prikongresajn komunikojn dissendis i.a. la agentejoj AP, Reuter kaj Pola Gazetar-Agentejo. En la Krakova gazeto *Dziennik Polski* (eldonnombro ĉ. 200 000)

aperis ampleksa intervjuo kun la estrarano de UEA, s-ro S. Świstak. Pri la historio de la UK-oj longe raportis la ĉefa bulgara gazeto *Robotniĉesko Delo*. La informadon al la eksterlando prizorgis ankaŭ la radiostacioj *Deutschlandfunk* kaj *Deutsche Welle*. Iliaj raportistoj surbendigis intervjuojn kun gekongresanoj el proksimume 15 landoj en iliaj respektivaj lingvoj por disaŭdigo tra la mondo, i.a. al Japanio.

Tiun senprecedencan diskonigon de nia ĉiujara internacia manifestacio ni ŝuldas al la elstare bonaj preparlaboroj kaj personaj kontaktoj, kiujn flegis dum la tuta antaŭkongresa jaro s-ino Elsbeth Bormann, al la bonege funkcia Kongresa Gazetara Servo kaj, nepre ne laste, al la anticipe preparitaj materialoj (artikoloj, prespretaj informoj kaj vigla, rapida informado), kiujn prizorgis d-ro U. Lins. Vere modela ekzemplo de bonega laboro, kiu meritas ĉies dankon.

Kopenhago 1975: Kontraŭe al Hamburgo, la preparoj por la Kopenhaga Gazetara Konferenco ne estis kontentige faritaj, kvankam la kongreso tamen vekis sufiĉan interesiĝon en gazetaraj medioj. La hasto, per kiu la Kongreso devis esti organizita (Kopenhago kiel kongresurbo 1975 ja estis elektita nur en la lastaj tagoj de la Hamburga Kongreso) verŝajne estas la kaŭzo, ke ne ĉiuj kongresaranĝoj povis esti planitaj kaj preparitaj sufiĉe frutempe kaj sufiĉe detale. Okazis dum la kongreso pluraj intervjuoj kun la prezidanto de UEA kaj aliaj estraranoj, membroj de la LKK kaj kongresanoj. Dum la tuta kongressemajno okazis ĉiutage esperantlingvaj radio-elsendoj de novaĵoj. Estas bedaŭrinde, ke dum la Kopenhaga kongreso aperis ankaŭ kelkaj artikoloj en la Dana gazetaro, en kiuj estis misprezentitaj la celoj kaj la laboro de UEA kaj kiuj sendube nocis al la prestiĝo de Esperanto ĝenerale. Samtendencaj artikoloj aperis ankaŭ en kelkaj alilandaj gazetoj. Feliĉe aperis ankaŭ pluraj tre favoraj pozitivaj artikoloj pri la 60-a jubilea Kongreso en i.a. francaj, germanaj kaj nederlandaj gazetoj. La Bulgara televido filmis en Kopenhago la teatraĵon prezentitan de Bulgara Esperanto-Teatro kaj faris el la filmita materialo duonhoran t.v.-programon, kiu poste estis dufoje elsendita en Bulgario.

Por pliaj informoj pri la Kopenhaga kongreso, vidu la ĉapitron 7.

Ateno 1976: Artikoloj aperis en pluraj grekaj gazetoj dum la jaro, kaj du televidaj intervjuoj — unu kelkminuta en decembro kaj alia duonhora en februaro — vekis grandan interesiĝon kaj ebligis malfermi multajn novajn kursojn. En marto estis aranĝitaj du akceptoj en salonoj de la Asocio de Eksterlandaj Ĵurnalistoj: la unuan vizitis multaj eksterlandaj ĵurnalistoj kaj diplomatoj; la duan ĉeestis raportistoj de la ŝtata televido kaj kelkaj grekaj ĵurnaloj. Pluraj novaj artikoloj rezultis.

Rejkjaviko 1977: Kvankam la UK en Islando malproksimas ankoraŭ je pli ol unu jaro, jam nun ĝi vekas intereson en medioj Islandaj de radio kaj gazetaro. Aperis jam kelkaj gazetartikoloj kaj televida intervjuo kun la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, okaze de lia vizito al la Islanda ĉefurbo.

(7) Esperanto en Radio: En la jaro 1975, dek tri radiostacioj en 10 landoj elsendis regule en Esperanto. Tio estas unu stacio malpli ol en 1974 pro forfalo de la kurso ĉe la stacio Clermont-Ferrand (Francio). Aliflanke okazis kresko de la nombro de elsendoj

(de 2335 ĝis 2432), kaj ankaŭ la nombro de elsendoj altiĝis (de 930 ĝis 985), ĉefe pro plivastigo de la elsendoj de Pola Radio (stacio Varsovio). En januaro 1976 la Vatikana Radio anoncis sian intencon disaŭdigi de tempo al tempo ankaŭ en Esperanto.

La ĉi-supraj statistikoj ne inkluzivas okazajn aŭ neregulajn elsendojn. Dum la UK en Kopenhago, ekzemple, la loka radiostacio elsendis ĉiumatene novaĵojn en Esperanto. Same ne estas inkluzivitaj radioprogramoj *pri* Esperanto. Pola Radio regule elsendas rubrikon pri Esperanto en kelkaj siaj eksterlandaj programoj, radio Pécs (Hungario) havas ĉiumonatan mallongan programon pri Esperanto, kaj Ibra Radio elsendas ĉiusemajne pri la Internacia Lingvo.

Je la 15-a de oktobro komenciĝis Esperanto-kurso en la Slovaka Televido. Ĝi konsistis el 17 lecionoj duonhoraj, interpretitaj de profesiaj aktoroj.

9. EKSTERAJ RILATOJ

A. ĜENERALA TRARIGARDO

(1) Nuna situacio: Drasta plivastiĝo de la kunlaborantaro kaj pli substantaj kontaktoj kun la diversaj organizaĵoj internaciaj kaj naciaj — jen la du ĉefaj karakterizoj de la ĉi-jara laboro. La dua sekvis — kompreneble — el la unua. La starigo de laborgrupoj en Bruselo, Parizo kaj Novjorko ebligis pli intensajn rilatojn kun la tieaj internaciaj organizaĵoj kaj multe pli efikan priatentadon de ilia laboro, tiel ke UEA estas nun en pli bona situacio por ensalti, kiam prezentiĝas eblecoj pledi por Esperanto, atentigi pri la lingvaj problemoj, aŭ plifortikigi la pozicion de la Asocio. Sur kelkaj kampoj (ekzemple partia agado, sindikata agado, sporto) la kunordigo restas ankoraŭ ne adekvata, sed la Asocio nun sukcesis establi sufiĉe efikajn ligilojn ekzemple en la parlamenta agado. Ĝi daŭre plifortigas sian pozicion sur pluraj aliaj kampoj. Tio parte dankindas al la alta kvalito de la kunlaborantoj. Ne temas nur pri grupo de amatoroj sed pri homoj profesie spertaj pri internacia organiziĝo: inter la nunaj kunlaborantoj de UEA en la ekstera agado estas pluraj diplomatoj, stabanoj en internaciaj organizaĵoj kaj aliaj profesiuloj.

(2) La Gvidantoj: Gvidas la eksteran agadon de la Asocio la estrarano pri eksteraj rilatoj, d-ro H. Tonkin, kaj la tiucela Komisiono, kies aliaj membroj estas s-roj J. Guillaume (Francio), G. Leon-Smith (Britio), I. Schleicher (Danlando), S. Simeonov (Bulgario) kaj J. Uśpieński (Pollando). Kunlaboras ankaŭ la gvidanto de la Komisiono de TEJO pri Eksteraj Rilatoj, f-ino J. Sly (Britio) kaj la prezidanto de TEJO, s-ino C. Nourmont (Francio). La Komisiono kunsidis en Kopenhago kaj restis en koresponda kontakto dum la jaro. En januaro 1976 aperis ampleksa raporto pri la eksteraj rilatoj kaj estonta agado.

B. INTERNACIAJ REGISTARAJ ORGANIZAĴOJ

(1) Unesko kaj UN: La Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, en sia mesaĝo al la 60-a UK de Esperanto, atentigis interalie pri la laboro, kiun la esperantistoj entreprenis 'por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj'. Tiu mesaĝo, la unua publika, direktita de

Ĝenerala Direktoro de Unesko al UEA, aperis en la Kongresa Libro.

Partoprenis la inaŭguron de la kongreso kiel reprezentanto de la Dana Unesko-Komisiono ĝia prezidanto, s-ro Preben Kierkegaard. UN ankaŭ kontribuis al la kongreso per esperantlingva aperigo de raporto pri la konferenco en Meksikio, kies temo estis la Internacia Jaro de la Virino (vidu sube). Lastatempe UN ankaŭ eldonis en la Internacia Lingvo tradukon de la Deklaracio pri la Donado de Sendependeco al Koloniaj Landoj kaj Popoloj.

La konsultajn rilatojn, kiujn ĝuas UEA kun Unesko, prizorgis dum la jaro la oficiala reprezentanto de UEA ĉe Unesko, s-ro Emmanuel Chicot (detalojn pri tiuj rilatoj oni povas legi en la Jarlibro de UEA). S-ro Chicot ricevis helpon de regule kunvenanta laborgrupo pri Unesko, kiu sekvas la laboron de la Organizaĵo kaj laŭeble intervenas. Tiu grupo konsistas el : s-ro R. Despiney (informado), d-ro M. Duplan (scienco), s-ino J.M. Liouville-Cash (junularo) kaj s-ro R. Rougetet (kulturo), plus s-ro Chicot mem (edukado). UEA estas regule reprezentata en kunvenoj de Unesko. Delegacio de la Asocio, sub gvido de la estrarano pri eksteraj rilatoj, ĉeestis la 15-an Konferencon de Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj en Parizo en novembro kaj partoprenis ties debatojn. La unua en la nova serio de *Esperanto-Dokumentoj*, eldonataj de UEA, pritraktas dudek jarojn de kunlaboro inter UEA kaj Unesko, tiel markante la dudekan datrevenon de la rezolucio de Unesko pri Esperanto (Montevideo 1954). Pluraj landaj asocioj kunlaboras kun siaj respektivaj Unesko-Komisionoj, kaj nova cirkulero de UEA al la landaj asocioj en januaro 1976 aparte atentigas pri la graveco de tiu kunlaboro. Inter la landoj, kie okazas kontaktoj, estas Kanado, Svislando kaj Kolombio. Tiu kanalo de kontaktoj kun Unesko tra la naciaj komisionoj povus fariĝi tre grava en estontaj kampanjoj.

La estrarano pri eksteraj rilatoj vizitis la sidejon de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko en decembro 1975. Dum tiu vizito fondiĝis nova konstanta laborgrupo, kies ĉefa tasko estas sekvi la laboron de UN kaj reprezenti la Asocion. Prezidas ĝin la reprezentanto de UEA ĉe UN, s-ro Mark Starr; sekretario estas s-ro G. Bertucci, kaj ĝia konsilanto estas L.E. la Ambasadoro de Aŭstralio, s-ro Ralph Harry. La laborgrupo nun studas ampleksan programon por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la laboron de UN. Komuna alvoko, lastatempe sendita de la prezidanto de UEA kaj la loka grupo al novjorkaj esperantistoj, celas intensigon de la kunlaboro inter lokaj esperantistoj kaj la laborgrupo ĉe UN.

UEA nun esploras ĉe Unesko la eblecon okazigi komunan seminarion pri lingva diskriminacio en la kunteksto de rasa diskriminacio, kiel kontribuon al la Jardeko Kontraŭ Rasismo (vidu la Estraran Raporton 1974-75).

La Asocio starigis novan informan servon pri UN sub gvido de s-ro M. Starr. Detalojn oni anoncis en la januara numero de la revuo.

Aperis en aprilo 1976 la unua numero de bulteno, *UN kaj Ni*, kiu celas ligi la diversajn laborantojn por Esperanto ĉe UN kaj Unesko, liveri utilajn informojn

pri la laboro de UN kaj Unesko al la Esperanto-gazetaro kaj informadi al tiuj membroj de UEA, kiuj aktive interesiĝas pri UN. Redaktas ĝin s-ino A. Woessink-Nagata.

(2) Internacia Jaro de la Virino: La ampleksa laboro de UEA kunligite kun la Virina Jaro estas traktita en Esperanto-Dokumentoj 5 E (1976) kaj parte en 3 A (1975). Gvidis la laboron kvinpersona komisiono sub gvido de s-ino Elsbeth Bormann (FRG). Aliaj anoj estis Ursula Grattapaglia (Brazilo), Yukiko Isobe (Japanio), Erzsebet Pallós (Hungario) kaj s-ro Ib Schleicher (Danlando). Kvankam la agado de la komisiono kulminis en la 60-a UK, raportita aliloke en tiu ĉi raporto, vasta agado okazis ankaŭ sur internacia, landa kaj loka niveloj.

UEA estis reprezentita de s-ro M. Starr kaj s-ino de Bancalari en la renkontiĝo de neregistaraj organizaĵoj kadre de la Konferenco de UN pri la Virina Jaro (Meksikio, junio 1975), kaj en kelkaj neregistaraj virinaj konferencoj. La revuo amplekse raportis pri la Jaro, aperigante i.a. la mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la Internacia Virina Tago. Dek ok landaj asocioj nomis komisiitojn pri la Virina Jaro kaj centoj da lokaj kluboj kaj regionaj organizaĵoj okazigis kunsidojn dediĉitajn al la Jaro. Kelkaj landaj Esperanto-kongresoj estis dediĉitaj parte aŭ tute al la temo de la Virina Jaro, kaj la Esperanto-gazetaro kaj radio vaste raportis. En la demando pri lingvaj limoj malhelpantaj virinan unuecon kaj en la paraleloj inter lingva kaj seksa diskriminacio, la esperantistinoj trovis atentokaptan temon, kiun ili multe utiligis en intervenoj kaj elpaŝoj ĉe ne-esperantistaj virinaj konferencoj kaj en abundaj nacilingvaj gazetartikoloj kaj radio-intervjuoj. Dum siaj kunsidoj en Kopenhago, la Komitato decidis renovigi la mandaton de la Komisiono pri la Virina Jaro, nun nomata 'Komisiono pri Virina Agado'. La konsisto restas sama kun escepto de s-ro Schleicher, kiu retiriĝis en Kopenhago pro aliaj respondecoj en la Komitato.

(3) Monda Organizaĵo pri Sano: Protesto ĉe MOS pro ĝia alpreno de pliaj laborlingvoj (la araba kaj la ĉina), kaj ties negativa efiko sur la buĝeto, estis organizita de s-ro Claude Piron. Ĝi havis notindajn rezultojn en la gazetaro, kaj pluraj dekoj da ĵurnaloj en Svislando, Francio, Belgio, Jugoslavio, Finnlando, Britio (kaj eble en aliaj landoj ankaŭ) aperigis artikolojn pri tiu temo. La kampanjo, kiu atentigas pri la kostoj de multlingveco en MOS, la sekva perdiĝo de gravaj financaj rimedoj kaj la solvo, kiun prezentas Esperanto, daŭras, ĉefe en la parlamenta agado en kelkaj landoj, interalie en ligo kun la Monda Tago de la Sano (aprilo).

(4) Universala Poŝta Unio: UEA promesis sian helpon al la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA), kiu gvidas kampanjon por la enkonduko de Esperanto en la laboron de UPU.

(5) Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj: La unuaj kontaktoj kun OAS okazis en 1974-75. UEA nun nomis s-ron Affonso Correa kiel komisiiton de UEA por esplori pli intimajn kontaktojn kaj eblecojn de kunlaboro sur la lingva kaj kultura kampoj.

(6) Eŭropa Komunumaro: La laboro konsiderinde ampleksiĝis dum la jaro. Kvankam UEA mem ne

respondekas rekte pri kontaktado kun la organoj de la EK, ĝi intime rilatas kun la Eŭropa Esperanto-Centro (Nederlando), kiu siavice organizas la kunlaboron de la landaj Esperanto-asocioj en la Ŝtatoj-membroj de la EK. Rezulte de interveno de la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj dum lia vizito al Bruselo, oni fondis en januaro 1976 en tiu urbo laborgrupon, kiu flegos la kontaktojn ne nur kun la EK sed ankaŭ kun internaciaj neregistaraj organizaĵoj, kies sidejoj troviĝas en la belga ĉefurbo. Membroj de tiu ĉi grupo estas s-roj J.G. Catling, E. Svane kaj S. Ziegler. Ĝia unua tasko estas daŭre sekvi la laboron de la EK kaj identigi tiujn punktojn, kiuj meritas apartajn intervenojn por atentigi pri lingvaj problemoj kaj pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo.

En la monata revuo de la Eŭropa Komunumaro aperis artikolo pri la 'Babel-tura lingvo-konfuziĝo en la EK', post kiu dekoj da leteroj estis senditaj al la redakcio, preskaŭ senescepte urĝe rekomendantaj Esperanton kiel la solan racian solvon.

La organizantoj de la Eŭropa Esperanto-Kongreso (Pasko 1976, Eindhoven, Nederlando) sendis, antaŭ la okazigo de la kongreso, nacilingvan leteron al ĉiuj 250 membroj de la Eŭropa Parlamento, atentigante pri la okazonta Eŭropa Kongreso kaj pri la unika solvo, kiun elektis la esperantistoj (la nacia lingvo por enlandaj kontaktoj, la Internacia por interkomunikado kun nesamlingvanoj). Pluraj parlamentanoj respondis tre favore.

La Centro por Eŭropa Edukado daŭre eldonadas sian tre utilan bultenon *Eŭropa Dokumentaro* en Esperanto. La Eŭropa Junulara Fondaĵo finance subtenis seminarion de TEJO kaj la administran laboron de ĝia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj.

(7) Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo: La fina sesio de tiu konferenco okazis en Helsinki samtempe kun la UK en Kopenhago. La Komitato de UEA sendis oficialan mesaĝon al la konferenco, kiu atentigis i.a. 'ke la ĉiam kreskanta problemo de multlingveco grave bremsas la liberiĝon kaj plivastiĝon de la kunlaboro celata de la Konferenco' kaj ĝi proponis 'ke la komitato de registaraj ekspertoj, kiuj kontrolas la realigadon de la konferencaj decidoj, pozitive konsideru la jam entreprenitajn paŝojn por apliki Esperanton en sociaj, politikaj kaj sciencaj medioj ... kaj helpu al plejeble vasta antaŭenigo de tiuj klopodoj.' La kompleta teksto aperis en la septembra numero de la revuo.

UEA aperigis konsilaron pri utiligo de la Fina Akto de la Konferenco en la poresperanta laboro. Kelkaj landaj asocioj esploras la eblecon aperigi la tutan tekston de la Fina Akto en Esperanto. Artikolo pri la Fina Akto aperis en la oktobra numero de la revuo.

C. INTERNACIAJ NEREGISTARAJ ORGANIZAĴOJ

(1) La Rolo de Neregistaraj Organizaĵoj: UEA estas membro de komitato de neregistaraj organizaĵoj, kiu preparas mondan konferencon pri la tuta demando ĉirkaŭ la rolo de neregistaraj organizaĵoj en organizaĵoj esence interregistaraj. La celo de la konferenco estos plifortigi la voĉon de neregistaraj organizaĵoj en internaciaj medioj. S-ino A. Woessink-Nagata kaj

s-ro W. Janssen (ambaŭ Nederlando) reprezentis UEA ĉe la unua kunsido de tiu komitato, okazinta en decembro en Nederlando.

(2) Fakaj Organizaĵoj: Dank' al la laboro de la prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, prof. B. Popović, la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj nun definitive decidis aperigi sian revuon *Scienca Mondo* en Esperanto. Tiu estas nur unu el la atingoj rezultintaj el la kelkfoje intima kunlaboro inter fakaj Esperanto-asocioj kaj ties paralelaj internaciaj organizaĵoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj reprezentis la Asocion ĉe la kombinita konferenco de FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj) kaj ACTFL (Amerika Konsilantaro de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj), kiu okazis en Vaŝingtono (Usono) en novembro.

Grava nova iniciato de la Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI) kondukis al starigo de komisiono por esplori la valoron de instruado de la Internacia Lingvo. En tiu sesmembra komisiono troviĝas kiel reprezentantoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) nia komitatano s-ro G. Leon-Smith, ano de la Konsulta Komisiono pri Edukado s-ro G. Pirlot, kaj s-ro C. Piron. La starigo de tiu komisiono grandparte ŝuldiĝas al la laboro de ILEI kaj de la Eŭropa Esperanto-Centro. UEA ankaŭ starigis senperan kontakton kun EAI.

(3) Sindikataj Organizaĵoj: Pro manko de taŭga kunlaboro, la iniciatoj de 1974-75 (vidu la Estraran Raporton 1974-75) ĝis nun ne alportis konkretajn rezultojn.

(4) Sporto: Grupo en Montrealo (Kanado) sub gvido de s-ro U.P. Ronald reeldonas la konatan plurlingvan sportan frazlibron, kiun siatempe kompilis s-ro Ralph Harry. Ĝi celas esti utiligata de diversbranĉaj sportistoj dum la Olimpikaj Ludoj. La serĉado de taŭga konstanta komisiito de UEA pri Sporto nun proksimiĝas al fino, kaj ni esperas baldaŭ povi anonci la nomon kaj la agadprogramon de la koncerna persono.

(5) Socialistaj Organizaĵoj: Kvankam ne mem prenante politikan pozicion, UEA atente sekvas la agadon de s-ro A. Menabene (Italio) pri subteno de Esperanto flanke de socialistaj kaj socialdemokrataj partioj kaj organizaĵoj. Laŭeble UEA donas sian helpon. Oni nun planas konferencon de socialistaj partioj pri la lingva problemo kaj Esperanto en Romo en la jaro 1977.

(6) Skoltoj: Dank' al la donaco de f-ino Betty Salt, farita al UEA por akceli la utiligon de Esperanto en la skolta movado, la Skolta Esperanto-Ligo planas aperigi libreton en pluraj nacilingvaj eldonoj pri la diversaj internaciaj programoj de skoltismo kaj ties potencialaj ligoj kun Esperanto.

(7) SAT: Dialogo kun Sennacieca Asocio Tutmonda daŭras en plej amika atmosfero. UEA sendis reprezentanton al la SAT-Kongreso en Hago (julio - aŭgusto 1975), nome s-ron T. van Woerden. Ankaŭ okazis interparolo inter la prezidantoj de UEA kaj SAT en Parizo, en novembro 1975.

Ĉ. REGISTAROJ KAJ NACIA AGADO

(1) Diplomaciaj Medioj: Pasintjare ni indikis nian kontenton pro tio, ke 17 landoj sendis oficialajn

reprezentantojn al la inaŭguro de la 59-a UK de Esperanto kaj ke 4 el ili alparolis la kongreson en Esperanto. En Kopenhago UEA atingis eĉ pli imponan nombron : partoprenis la inaŭguron reprezentantoj de entute 22 ŝtatoj, el kiuj 6 salutis la kongreson en la Internacia Lingvo. Kompreneble oni povas sin demandi, ĝis kiu grado tio signifas seriozan interesigon pri Esperanto flanke de la koncernaj registaroj, sed ĝi ja montras la kreskantajn prestiĝon kaj rekonon, kiujn hodiaŭ ĝuas la lingvo. Samtempe kreskas la aktiva agado en la Esperanto-movado de pluraj diplomatoj tra la mondo, kiuj jam parolas Esperanton.

(2) Politikaj Partioj: La agado por Esperanto en tiuj medioj daŭras, ĉefe kunlige kun la agado inter socialdemokrataj partioj (vidu supre), kvankam ne limigite al tio. La agantoj sur tiu ĉi tereno laboras ĉefe por unu el tri celoj : subteno de la koncerna partio en iu agado, kiu celas enkondukon de Esperanto (ekz. Francio), ĝenerala rekono de la valoro de Esperanto (ekz. Italio), starigo de lingva politiko en la koncerna partio (ekz. FRG).

(3) Parlamenta Agado: Okazis notinda rapidiĝo de la ritmo. UEA nomis novan Komisiiton pri Parlamenta Agado, s-ron G. Leon-Smith, kaj lanĉis aktivan kunordigan agadon. En la unuopaj landoj oni notas esperigajn progresojn. La brita parlamenta grupo nun kreskis al 56 membroj-parlamentanoj, dum en Francio oni organizas la parlamentanojn ĉirkaŭ leĝpropono, kiu celas ebligi oficialan instruadon de Esperanto en la lernejoj. S-ro Leon-Smith donas apartan atenton al la disvastigo de utilaj ideoj, konsiloj kaj novaĵoj al la aktivuloj sur la parlamenta kampo en pluraj landoj. En la landoj de la Eŭropa Komunumaro, UEA intime kunlaboras kun la Eŭropa Esperanto-Centro kaj esploras i.a. kiamaniere plej efike agadi ĉe la Eŭropa Parlamento (vidu supre). La Esperanto-Influgrupo, kiu gvidas la parlamentan agadon en Britio, komencis eldoni en aprilo 1976 novaĵleteron por UEA, kies celo estas ligi la parlamentajn agantojn en la diversaj landoj kaj liveri al ili freŝajn ideojn kaj gravajn novaĵojn. Redaktas ĝin s-ro David Curtis.

(4) Neregistaraj Organizaĵoj: Parolantoj de Esperanto aktivas en multaj naciaj neregistaraj organizaĵoj, ekzemple Asocioj pri UN, turismaj organizaĵoj, kulturaj kaj fakaj organizaĵoj. La estrarano pri eksteraj rilatoj, kunlabore kun homoj aktivaj en tiuj medioj, laboras por intensigi la agadon ĉe naciaj asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj, laŭ rekomendo de la Komitato de UEA. Aktivado inter mondfederalistoj restas intensa, kaj la brita sekcio lastatempe akceptis rezolucion favoran al Esperanto.

10. KULTURA AGADO

A. ĜENERALA TRARIGARDO

Nuna situacio: UEA estas la ĉefa internacia liganto de la parolantaro de Esperanto. Kiel establanto de normoj, ŝirmanto de kvalito kaj iniciatanto de aktivecoj, ĝi do havas aparte grandajn respondecojn. La jaro 1975-76 estis plejgrandparte sukcesa jaro en tiuj rilatoj : okazis Universala Kongreso kun altkvalitaj kulturaj eroj; la Belartaj

Konkursoj montris novan, esperigan vivon kaj fortan senton de respondeco kiel stimulo al altnivela verkado; la Internacia Somera Universitato, en sia iom nova vesto, estis tre sukcesa evento. La Komitato de UEA jam aprobis la starigon de Komisiono pri Kulturo, kies membroj espereble elektiĝos dum la 61-a Universala Kongreso.

B. KULTURAJ EVENTOJ

(1) Internacia Somera Universitato: La 28-a sesio, okazinta en la kadro de la 60-a UK, enhavis kelkajn novajn elementojn. Ĝi konsistis ne nur el ok prelegoj de konataj profesoroj, sed krome el pluraj malgrandaj seminarioj plejparte gvidataj de la prelegintoj kaj laŭteme identaj al la prelegoj. Tiuj lastaj pritraktis ĉefe kvin fakojn : lingvistiko, naturscienco, literaturo, edukado kaj virinaj studoj. Du prelegoj estis rekte ligitaj al la ĉefa temo de la kongreso 'La Virino'.

Rektoro de I.S.U. estis d-ro Paul Neergaard (Ŝtata Instituto de Sempatologio, Kopenhago), kiu ankaŭ inaŭguris la sesion per prelego. Lekciis krome d-ro Werner Bormann (FRG), inĝ. Boĵidar Leonov (Bulgario), d-ro Humphrey Tonkin (Usono), s-ro Michel Duc Goninaz (Francio), d-ro Bruce Sherwood kaj s-ino Judy Sherwood (Usono), prof. d-ro C. Støp-Bowitz (Norvegio) kaj prof. Toshide Kuwahara (Japanio). Seminariojn gvidis inĝ. Leonov, d-ro Bormann, d-ro Tonkin, s-ro Duc Goninaz kaj d-ro Sherwood. La inaŭgura prelego aperis en la januara numero de la revuo *Esperanto*.

La programon prizorgis tripersona komisiono sub gvido de d-ro J. Pool. Por la unua fojo en la lastaj jaroj oni invitis sinproponojn de eventualaj prelegantoj pere de la revuo (antaŭe prelegoj ĉiam okazis laŭ invito). La 29-an sesion organizos komisiono gvidata de s-ro Duc Goninaz, kies membroj estas d-ro Pool kaj prof. Kawamura.

(2) Belartaj Konkursoj: La konkursoj festis, en 1975, sian 25-jaran datrevenon. Markis la jubileon aparta artikolo en la Kongresa Libro kaj festa kunsido en la Universala Kongreso mem. La kunsidon prezidis la prezidanto de la juĝkomisiono, s-ro Baldur Ragnarsson (Islando). Eniris la konkursojn entute 88 literaturaĵoj : 58 poemoj, 23 prozaĵoj kaj 7 drametoj, verkitaj de entute 39 aŭtoroj el 17 landoj. Tiu nombro estas iom malpli alta ol la pasintjara. Enkondukiĝis nova konkursbranĉo, la fotografio.

La konkursaĵojn prijuĝis komisiono laŭ jena konsisto : Vilmos Benczik (Hungario), Edwin de Kock (Sudafriko), Miyamoto masao (Japanio), Carlo Minnaja (Italio), Johan H. Rosbach (Norvegio), Ivo Rotkvić (Jugoslavio), Pierre Ullman (Usono), Eli Urbanová (Ĉeĥoslovakio) kaj Baldur Ragnarsson. Alec Venture (Britio) funkciis kiel sekretario. La fotografian branĉon juĝis Torben Kehlet (Danlando) kaj Vilho Setälä (Finnlando). Nova elemento en la konkursoj estis ampleksa raporto de la juĝkomisiono pri la kvalito de la diversaj eroj. Tiu raporto plus la nomoj de la premiitoj en la jubilea sesio aperis en la septembra numero (1975, paĝoj 149-150) de la revuo *Esperanto*.

(3) Premioj Schwartz kaj Minnaja: Fine de 1975 la Asocio anoncis detalojn pri du novaj kulturaj premioj. La premio Raymond Schwartz, kiu honoras la

konatan Esperanto-verkiston, estos aljuĝita, en la jaro 1980, al la plej bona 'ankoraŭ ne eldonita proza fikciaĵo en Esperanto'. Temas pri premio de 4 300 guldenoj por romano aŭ kohera novelaro de almenaŭ 40 000 vortoj. La premio Minnaja, kiu honoras la italan esperantistan gvidanton Luigi Minnaja, estos aljuĝita ĉiujare por la plej bona eseo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun Esperanto kaj ĝia uzado. La gvidantoj de la Belartaj Konkursoj administras ambaŭ premiojn.

(4) Aliaj Eventoj: La Someraj Universitataj Kursoj (S.U.K.) okazos en aŭgusto 1976 en la Universitato de Antverpeno sub aŭspicio de UEA. La ĉi-jara sesio pritraktos la fakojn biologio, matematiko kaj sociologio. UEA ne nur donis sian aŭspicion al tiu grava evento sed subtenis la aranĝon ankaŭ materie. La decembra numero de la revuo *Esperanto* estis speciale dediĉita al la beletro; ĝi enhavis kontribuojn de pluraj eminentaj Esperanto-verkistoj.

C. SERVOJ KAJ KOMISIONOJ

(1) Servoj: La Magnetofona Servo, kiun gvidas s-ro R. Eichholz (Kanado) ne estis multe uzata dum la jaro 1975-76, malgraŭ ke la haveblaj surbendigoj atingis preskaŭ 100 programojn. La Koresponda Servo Mondskala, sub gvido de f-ino C. Hueter (Francio), estis malhelpata de pluraj poŝtaj strikoj en okcidenteŭropaj landoj; ĝi tamen liveris 1 760 novajn adresojn (kontraŭ 1255 pasintjare) per 996 poŝtaĵoj. La Lingva Servo plue funkciis sed estas nur malmulte uzata.

(2) Komisionoj: La Kontrolkomisiono pri Lernolibroj kaj la Komisiono por la Internacia Ekzameno estas ambaŭ en stadio de reorganizigo. La unuan gvidas provizore s-ro D.B. Gregor (Britio) kaj la duan d-ro J.C. Wells (Britio). La estrarano pri kulturaj agadoj nun esploras plivastigon de la Kontrolkomisiono kaj diskutigas la membrojn de la Ekzamena Komisiono pri modifoj en la strukturo de la Internacia Ekzameno kaj pri eventualaj aldonaj aktivecoj. En 1975 sin prezentis du kandidatoj por la Internacia Ekzameno, sed ambaŭ malsukcesis.

(3) Semajno de Internacia Amikeco: Nova konsilaro pri la Semajno, eldonita de UEA, enhavas sugestojn pri manieroj festi la Semajnon kaj plej efike utiligi ĝin en la informa agado. La konsilaro celas precipe lokajn grupojn kaj landajn asociojn. La agadon gvidas la Komisiito, s-ro Erik Carlén (Svedio). Ankaŭ en 1976, la Semajno rikoltis konsiderindan publikan reeĥon.

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) Estraro: La Estraro konsistas el 10 anoj, elektitaj en Fredericia (Danlando) okaze de la 31-a IJK de TEJO. Ili havas la jenajn taskojn: Claude Nourmont (Francio) prezidantino, Savas G. Tsitirides (Grekl.) kaj Klaus Schubert (FRG) vicprezidantoj, Brunetto Casini (Italio) ĝenerala sekretario, Ineke Emmelkamp (Nederlando) sekretariino de la komitato, Paul Peeraerts (Belgio) financa zorganto, Juan Azcuénaga (Hispanio), Margarita Nájera (Meksikio), Stefan MacGill (Novzelando) kaj Angel Todorov (Bulgario)

membroj. Post meritplena laboro forlasis la estraron de TEJO Flora Szabó-Felső, Ulrich Brandenburg kaj Rada Gavrilović.

La estraro kunsidis dum la 31-a IJK en Fredericia kaj dum la tuta jaro restis en daŭra skriba kontakto.

Dum la 31-a IJK la komitato de TEJO elektis d-rinon Flora Szabó-Felső kiel honoran prezidanton de la organizaĵo.

(2) Komitato: La komitato de TEJO konsistas el 39 membroj, el kiuj 7 estas komitatanoj B kaj 7 estas laŭofice komitatanoj. La kongreson en Fredericia ĉeestis 37 komitatanoj aŭ rajtigitaj anstataŭantoj, kiuj kunsidis trifoje en pleno kaj plurfoje en komisionaj kunsidoj pri financoj kaj kongresa rezolucio. Kunordigis la laboron ĝis julio 1975 la ĝenerala sekretario, kaj ekde aŭgusto la sekretario de la komitato, f-ino Ineke Emmelkamp, pere de persona korespondado kaj de la informa bulteno 'Koncize'.

(3) Membraro:

a) Sekciaj Membroj: Jen sekvas la membronombroj de la unuopaj landaj sekcioj, kalkulitaj laŭ la stato fine de 1975. Antaŭ la plusa signo (+) estas la nombro de la membroj ĝis 25 jaroj, post la plusa signo tiu de membroj pli ol 25-jaraj. Interkrampe aperas la membronombro fine de 1974 (sen distingo de aĝo). La ciferoj respegulas la informojn donitajn de la unuopaj landaj sekcioj. Demandosigno indikas, ke la koncerna landa sekcio ne sendis raporton kaj ke la eventuala cifero estas nur hipoteza.

Argent.	20+	13(50)	Koreo	?	(105)
Aŭstral.	10 ?	(?)	Kolomb.	50 ?	(?)
Aŭstrio	700 ?	(751)	Malagas.	400 ?	(?)
Belgio	124+	0(150)	Meksiko	100 ?	(?)
Brazilo	30+	10(?)	Nederl.	38+	28(67)
Britio	50 ?	(50)	Novzel.	48+	43(55)
Bulgar.	1200+	1700(?)	Polland.	1300+	0(?)
Ĉilio	50 ?	(?)	FRG	303+	17(320)
Danl.	40+	3(35)	Grekl.	24+	27(50)
Francio	77+	0(70)	Hispan.	191+	52(233)
GDR	70+	130(200)	Hung.	1440+	60(?)
Italio	261+	48(312)	Sved.	150+	0(?)
Israelo	44+	34(?)	Svisl.	15+	0(?)
Jugosl.	2600+	360(?)	Usono	150+	0(?)

Ekzistas krome kelkaj landaj sekcioj en stato de organizigo; el ili la plej viglaj estas Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Norvegio kaj Sovetunio.

b) Individuaj Membroj: La nombro de la individuaj membroj dum la lastaj kvin jaroj sekvas ĉi-sube:

jaro	J-MJ	J-MA	MA-K	DM-K	Sumo
1971	68	148	157	?	373
1972	40	159	110	?	309
1973	37	187	148	?	372
1974	65	129	126	4	324
1975	49	122	104	6	281

Krome aliĝis al TEJO el la jaro 1975 29 Patronaj Membroj.

(4) Landaj sekcioj: Pri la rilatoj kun la landaj sekcioj respondecas la ĝenerala sekretario de la organizaĵo, s-ro Brunetto Casini. La nombro de aliĝintaj landaj sekcioj estas 29. Aparte viglas la agado en Danlando, FRG, Hispanio kaj Nov-Zelando. La sekcioj en Usono kaj en Brazilo entreprenis, post kriza periodo, paŝojn por restarigi efikan laboron.

Dum la tuta jaro la kontaktoj kun la landaj sekcioj estis tenataj per la informpaĝo en la revuo *Koncize* kaj per cirkuleraĵoj *Komunaj Leteroj* dumonataj de la ĝenerala sekretario de TEJO.

(5) **Administrado:** La administradon de TEJO prizorgas la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, kunlabore kun la financa zorganto de TEJO, s-ro Paul Peeraerts.

(6) **Regiona Agado:** Pri la regiona agado ĉefe respondecis la estrarano Juan Azcuénaga kaj kunlaboris en la estraro Margarita Nájera por la Amerikaj ŝtatoj kaj Stefan MacGill por la Malproksima Oriento. La agado estis vigla kaj kontinua, kvankam necese ofte limigita al korespondaj kontaktoj kaj liverado de materialoj, informaj aŭ didaktikaj. Meritas apartan mencion la agado realigita en Koreo kaj Japanio, ankaŭ danke al la tiea vojaĝo de la vicprezidanto de TEJO, s-ro Klaus Schubert.

(7) **Pasporta Servo:** La Pasporta Servo, daŭre gvidata de s-ino Jeanne-Marie Cash, tre viglis dum la raporta jaro. Ĝia celo estas ebligi al esperantistoj vojaĝi eksterlanden malmultekoste kaj inteligente, en pozitiva kontakto kun la loĝantaro en la vizitataj landoj, kaj ebligi al nevojaĝemaj esperantistoj helpi la vojaĝemulojn ĝui spirite riĉigajn tagojn kaj akiri internacian amikaron. Kompare kun la jaro 1974, en 1975 disvendiĝis pli da broŝuroj kaj efektiviĝis pli da gastigoj. Aperis la tria broŝuro, por 1976, kun 180 adresoj en 40 landoj (kompare kun 100 adresoj en 33 landoj en 1975).

(8) **Kongresoj kaj Renkontiĝoj:**

a. *31-a IJK:* Ĝi okazis en Fredericia (Danlando) de la 19-a ĝis la 26-a de julio 1975. Ĝia ĉeftemo 'Interŝanĝo de Kulturo' estis pritraktita en prelegoj kaj diskutgrupoj dise tra la tuta semajno. Samtempe okazis seminario aranĝita de KER de TEJO, aparte intencita por neesperantistoj. Tre bonajn rezultojn donis la kongresa gazetara servo.

b. *60-a UK:* Ankaŭ dum la UK en Kopenhago okazis la tradicia 'Junulara Tago', dum kiu estis aranĝitaj pluraj diskutoj pri la problemoj de TEJO kaj de la junularo ĝenerale.

c. *Aliaj okazintaj aranĝoj:* KER de TEJO organizis internacian seminarion en Coimbra (Portugalia). Pluraj landaj sekcioj aranĝis seminarion, renkontiĝojn kaj alispecajn manifestaciojn, naciajn kaj internaciajn.

ĉ. *Venontaj aranĝoj:* La 32-a IJK de TEJO okazos en Tesaloniko (Greklando) de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1976. Ĝia ĉeftemo estos 'Lingvo kaj socio'.

(9) **Eldonaĵoj:**

a. *TEJO-paĝo:* Ĝi daŭre aperis kiel paĝo en la organo de UEA *Esperanto*, sub la redakto de ties ĉefredaktoro, s-ro Simo Milojević.

b. *KONTAKTO:* La nova redakta stabo de la revuo de TEJO *Kontakto* klopodis nuligi la akumuligintan malfruon en la apero de la gazeto, kiu ĝin karakterizis dum la lastaj jaroj. La enhavo estas altnivela, kaj la revuo konfirmis sian daŭran pozicion inter la plej elstaraj Esperanto-revuoj.

c. *Informpaĝo en 'Koncize':* La paĝo de TEJO en la internacia junulara revuo *Koncize* estas utiligata kiel organiza informilo por aktivuloj. Redaktaj ŝanĝoj kaj

aliaj problemoj de la revuo kaŭzis neregulan aperadon de la TEJO-paĝo.

ĉ. *NNN (Novaĵoj - Nouvelles - News):* Ĝi informas pri la agado de TEJO en la diversaj landoj kaj estas esence informilo por la gazetaro. Ĝi aperas ĉiun duan monaton en du lingvoj (angla kaj franca). En februaro 1975 la esperantlingva eldono estis ensorbita en la TEJO-paĝon de *Koncize*. La bulteno *NNN* estas realigata en la oficejo de la KER de TEJO, kiu ankaŭ produktas plurlingvan bultenon pri lingvaj problemoj per gazetar-eltondaĵoj, titolitan *Sufoko*.

d. *Eldonoj de landaj sekcioj:* Multaj el la landaj sekcioj de TEJO regule aŭ okaze eldonas proprajn gazetojn aŭ informilojn. En tiu ĉi sektoro okazis lastatempe pluraj ŝanĝoj: ĉesis aperi la Jugoslava gazeto *Jes, sed*, ĉesis la Itala partopreno en *Koncize* kaj la Itala kajero *ItInfo*, kaj ne alvenis informoj pri novaj entreprenoj tiurilataj.

e. *Aliaj eldonaj kaj informaj iloj:* Enkadre de pluraj eldonaĵoj ekzistas junulara rubriko, foje redaktata de junulo(j) mem. Tio konstateblas, ekzemple, en *Heroldo de Esperanto* kaj en pluraj organoj de landaj asocioj de UEA. *Radio Varsovio* regule produktas programojn aŭ programerojn destinitajn al la junularo.

(10) **Varbado:** La financa zorganto de la organizaĵo, s-ro Paul Peeraerts, gvidis la agadon sekvante la vojojn difinitajn de la ĝisnuna Komisiono pri Varbado.

(11) **Studenta kaj lerneja agado, Turisma kaj Koresponda Servo, kaj agado sur la kampo de Junularaj Delegitoj** estas gvidataj de la estrarano s-ro Angel Todorov (Bulgario). Estas nuntempe pristudata la ebleco de plena reorganizo de la Junularaj Delegitoj.

(12) **Arbitracia Tribunallo:** Ĝi konsistas el Jeanne-Marie Cash, prezidanto, Renée Triolle, Hans Eichhorn, Hans Bakker, Rada Gavrilović, membroj. Dum la raporta jaro la Tribunallo ne bezonis interveni.

(13) **Edukado:** La agadon sur tiu ĉi kampo transprenis la sekretario de TEJO, s-ro B. Casini. Konstatindas, ke la plej bona laboro de tiu ĉi fako povas esti farata je landa nivelo. Specialan intereson pri tiu problemaro montras la Itala kaj Jugoslava sekcioj. En la kadro de la 32-a IJK, TEJO antaŭvidas programerojn, kiuj celas stimuli tiun ĉi demandon.

(14) **Organizaj aferoj:** Dum la laborjaro la estraro de TEJO plue analizis la eblecojn por nova, reformulita Statuto de la Organizaĵo, celante fiksi signifajn bazajn trajtojn por ĝi. Plue montris sian utilon la unua trijara laborplano de la organizaĵo, kiu ekrealiĝas.

(15) **Ekstera agado:** Kunordigis la internacian agadon la oficejo de la TEJO-komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER), kies sidejo estas, ekde la 1-a de januaro 1976, Riouwstraat 172, Hago (Nederlando). La komisionon gvidis ĝis la 31-a IJK la estrarano de TEJO, s-ino Rada Gavrilović, kiu samtempe deĵoris plentempe en la KER-oficejo. De tiam transprenis la gvidadon f-ino Ineke Emmelkamp, estrarano, dum en Hago deĵoris pli frue s-ro Jim Cushing, poste Janet Sly, al kiu baldaŭ aldoniĝos s-ro Marc Hiltbrand. La laboron forte helpis surlokaj kunlaborantoj. Oni aranĝis i.a. seminarion dum la Fredericia IJK, pri la temo: 'Lingvo kaj malkoloniigo', kaj seminarion en

Coimbra, 5 - 11 oktobro 1975, pri 'La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado' kaj krome KER reprezentis TEJO'n en ses seminarioj de aliaj internaciaj organizaĵoj. KER ankaŭ aktive partoprenis en pluraj naciaj Esperanto-aranĝoj, ĉefe junularaj. Pri la eldona agado de KER vidu sub par. 9 de tiu ĉi ĉapitro.

(16) Konkludoj: Ankaŭ ĉi-jare la laboro de TEJO estis intensa kaj fruktodona. Specife ĝi dediĉis siajn strebojn al kunordigo de la loka agado ne nur tie, kie jam ekzistas fortaj sekcioj, sed ankaŭ tie, kie la movado lamas aŭ preskaŭ ne ekzistas. Tiun ĉi laboron realigis ĉefe la Komitato, ĉar ankoraŭ ne estas plene finpolurita rekta inform-strukturo al la landaj sekcioj. Al la plej malfortaj landoj sin turnis ankaŭ la t.n. regiona agado, ankoraŭfoje impresa tiel laŭkvante kiel laŭkvalite. Tiu plurjara laboro komencas porti fruktojn, ĉar ĉi-jare starigantaj landaj sekcioj petis oficialan aliĝon al TEJO.

Krome oni laboris kun la celo igi la servojn de TEJO, inter kiuj elstaras la pasporta servo, daŭre pli valoraj kaj pli facile utiligeblaj. Ankaŭ la IJK-jn TEJO celas igi pli interesaj kaj kulture pli gravaj, per elekto de taŭgaj kaj tiklaj temoj kaj per starigado de ĉiam pli science aranĝitaj studgrupoj.

El la laboro de la lastaj jaroj evidentiĝis ankaŭ la streboj doni pli novan, pli funkciajn strukturon al la eldona agado de TEJO. Tion pravas i.a. la subskribo de kontrakto kun la junulara revuo *Koncize* kaj pli preciza difino de la roloj de la unuopaj eldonaĵoj de TEJO kaj de ĝia KER. La ŝanĝoj okazintaj en la redakcio de *Kontakto* aldoniĝas hazarde al tiu ĉi laboro, sed ili tamen kontribuis por doni pli ĝeneralan valoron al tiu ĉi restrukturigo, kies celo ankaŭ estas solvi la jam menciitan problemon de rekta komunikado.

Aparte ni substreku la laboron efektivigitan de la TEJO-Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) per sia Haga oficejo kaj per ĉiuj siaj kunlaborantoj tra la mondo. Neniam sufiĉe oni povas emfazi, ke eĉ la plej bone organizita asocio, sen taŭga kaj aktiva oficejo por la eksteraj rilatoj, ne sukcesos alporti multon al niaj daŭraj strebadoj por defendi kaj antaŭenpuŝi Esperanton. Ke TEJO havas tian produktivan oficejon estas vere esperiga faktoro por la estonta laboro por la Internacia Lingvo.

12. LANDA KAJ FAKA AGADO

(1) Landaj Asocioj kaj Landa Agado: La nombro de aliĝintaj landaj asocioj kreskis de 33 al 34, sed aliĝis du novaj: Islanda Esperanto-Asocio kaj Luksemburga Esperanto-Asocio. Neniu landa asocio ekŝiĝis; la (provizora) malapero de unu landa asocio havas ĝojigan kaŭzon: en Koreo kvar tutlande laborantaj unuigoj (inter ili la aliĝinta al UEA) kunfandiĝis en unu novan landan asocion, kiu nun intencas peti aliĝon. Intertraktoj okazas kun la gvidantoj de la Esperanto-movado en kelkaj landoj pri stabiligo de la koncerna asocio aŭ pri aliĝo al UEA laŭ la kriterioj fiksitaj en la statuto de UEA.

La estrarano pri landa agado, vicprezidanto d-ro Bormann, daŭrigis en la raporta jaro siajn bonajn kontaktojn kun la landaj asocioj, i.a. per tri cirkuleroj

pri diversaj organizaj kaj kunordigaj taskoj. Al tiuj apartenas i.a. la kolektado de ĝisdatigitaj statutoj de la landaj asocioj. Li skribis pro sia UEA-ofico proksimume 250 leterojn dum la raporta jaro. Li ankaŭ kontaktis persone kun funkciuloj de landaj asocioj kaj ĉeestis la jarkongresojn de tri landaj asocioj: de Germana Esperanto-Asocio en Oberkirch, de Norvega Esperantista Ligo en Tromsø kaj de Dana Esperanto-Asocio en Kopenhago.

La Komitata Komisiono pri Landa Agado laboris skribe kaj — dum la UK en Kopenhago — ĉefe buŝe. En sia raporto al la Komitato ĝi indikas la eblojn de kunlaborado inter la landaj asocioj kaj inter ili kaj UEA. La komisiono akceptis planon por siaj proksimaj laboroj, inter kiuj elstaras la etendo de la agado al ĝis nun ne akiritaj terenoj. Ĝi alvokas la landajn asociojn en bonstataj landoj aparte helpi al elektitaj aktivularoj en landoj sen organizita movado aŭ kun nur malforta grupo. La komisionanoj forte bedaŭris la limigitajn eblojn pli ofte kunsidi. Tio plifortigis la deziron iam kunvoki konferencon de respondeculoj de landaj asocioj; tamen, unua cirkulera demando pri la ŝancoj de tia konferenco jam montras, ke la financoj estas malfacile venkebla baro.

Denove okazis, la trian fojon, dumkongresa kunsido de respondeculoj de landaj asocioj kaj landaj agantoj. En Kopenhago la ĉefa temo estis: Agado por Esperanto ĉe parlamentoj kaj registaroj. Ĉio estis organizita en prepara kunsido. Raportoj el landoj kun aktiva agado en tiuj oficialaj medioj donis al la aliaj landaj asocioj enkondukon en la manieron, laŭ kiu oni organizu la laboron. Pri la temo forte interesiĝis la komisiono pri eksteraj rilatoj. Krom la Brita, sep landaj asocioj ĝis nun komunikis al la estrarano por landa agado, ke ili nomis apartan respondeculon por parlamenta (kaj registara) laboro, kaj deko deklaris, ke tiu agado pro sia graveco estas entreprenata de la tuta estraro.

La kunlaboro inter landaj asocioj sukcese establiĝis en nova regiono per la okazigo de la 1-a Pacifika Kongreso de Esperanto en januaro 1976 en Melbourne (Aŭstralio). Ĝin partoprenis pli ol 200 esperantistoj el Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanio, Usono, Papuo-Novgvineo kaj kelkaj Eŭropaj gastoj. Estis decidite aranĝi Pacifikan Esperanto-Kongreson ĉiun kvaran jaron. Ekzistas daŭra kaj bona kunlaborado inter la landaj asocioj en la landoj, kiuj apartenas al la Eŭropa Komunumaro. La landaj asocioj de Belgio, FRG kaj Nederlando preparis Eŭropan Esperanto-Kongreson, kiu dum la Pasko-tagoj en 1976 okazis en Eindhoven (Nederlando).

(Vidu ankaŭ la ĉapitron pri 'Eksteraj Rilatoj').

Al peto pri raporto, farita de la ĉi-faka estrarano, pli ol la duono de la alskribitaj landaj asocioj, aliĝintaj al UEA, respondis senprokraste. Multaj aliaj reagis iom poste. Tio pravas la firman deziron pri kunlaborado sur tiu ĉi kampo. La ricevitaj respondoj respegulas la multifacetan Esperanto-vivon en la unuopaj landoj. Unuj fieris pri sukcesoj, aliaj montris deprimon pro rebatoj. Resume la raportoj, kaj trarigardo de la gazetaro de la landaj asocioj, permesas konkludi, ke dum la raporta jaro la pozicio de la organizita movado interne kaj ekstere plifirmiĝis. Kreskas la konsciigo pri la neceso direkti la tutan agadon eksteren. La pli

aktiva agado lastatempe en parlamentaj kaj ministeriaj rondoj estas pruvo de tio.

(2) Ekstereŭropa Agado: La Komisiito pri Regiona Agado, d-ro R. Corsetti (Italio), en la kadro de la taskaro estrara, okupiĝis precipe pri la disvolviĝo de ĝermantaj Esperanto-ĉeloj en ekstereŭropaj landoj, tute speciale en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj, pli ĝenerale, en tiuj landoj, kie ne ekzistas organizita movado. Jen sekvas lia raporto pri regiona agado dum la periodo 1 januaro 1975 ĝis la fino de februaro 1976:

Estas konata la ĝenerala principo, kiu impulsas la regionan agadon, tio estas la neceso ekvilibrigi la nivelon de la Esperanto-movado en ĉiuj mondpartoj, por malaperigi ĝian troan eŭropecon. Aliflanke niaj modestaj financaj rimedoj devigas nin sekvi labor-metodon, kiu baziĝas sur helpo al lokaj Esperanto-kernoj kaj al interesiĝantaj ne-esperantistoj. Dum ni ne havos pli da monaj rimedoj, ni ne povos lanĉi grandajn informkampanjojn, kiuj tamen estus necesaj por informi almenaŭ la klerajn soci-tavolojn en la evoluantaj landoj de Afriko kaj Azio — kaj parte ankaŭ en Latinameriko — pri la ekzisto de Esperanto kaj pri ĝiaj celoj.

La unuaj monatoj de 1975 estis dediĉitaj ankoraŭ ĉefe al kolektado el plej diversaj fontoj de adresoj de esperantistoj loĝantaj en Afriko kaj Azio kaj en aliaj landoj sen organizita movado. Iom post iom kolektiĝis adresaro, kiu ĝis nun ampleksas proksimume kvindekono da 'afrikaj' adresoj kaj saman nombron da 'aziaj'. Ĉiu esperantisto en tiu ĉi adreslisto estis individue kontaktita, kaj al ĉiu estis proponita helpo de UEA por lia surloka agado. Sekve de tiu agado ekligiĝis kontaktoj inter UEA kaj la aktivuloj en Afriko kaj Azio.

En Afriko aktivantaj kernoj, en kontakto kun kaj subtenataj de UEA, troviĝas nuntempe en Tuniso, Maroko, Senegalo, Zairo kaj Malagasio. Ilia aktivado konsistas ĉefe el instruado en kursoj kaj informado per prelegoj plus distribuado de informiloj. Menciindas prelegoj faritaj en Inezgano kaj Agadiro (Maroko) antaŭ granda publiko. Prelegoj, ankaŭ per radio, okazis en Malagasio laŭ informoj, kies ĝustecon tamen ne eblis kontroli. Organizado de 'Interaraba Esperantista Renkontiĝo' en Tuniso, dum la somero 1975, ne sukcesis pro manko de permeso flanke de lokaj aŭtoritatoj kiuj, pro nescio, estas suspektaj pri la Internacia Lingvo. Oni nun klopodas organizi junularan esperantistan labortendaron en Maroko por septembro 1976.

En Azio, en landoj sen organizita movado, aktivado subtenata de UEA okazis en Irano, Turkio kaj Filipinoj. En Turkio estas refondita Turka Esperanto-Asocio, kiu nun klopodas akiri ŝtatan permeson por fariĝi leĝe agnoskita organizaĵo. En Irano, pro reveno al Teherano de iama aktivulo kaj pro la almigro de eksterlanda esperantisto, la agado ricevis novan impulson. Okazis kurso en la Irana ĉefurbo, kaj aperis longa artikolo en scienca revuo, kiu rezultigis kelkajn informpetojn. En Hinda Unio okazas agado de kelkaj unuopuloj. Esperantistoj en Bangaloro funkciigas ankaŭ korespondan kurson. Stagna ŝajnas la Hinda Esperanto-Instituto. En la landoj de sudorienta Azio nur kelkaj unuopuloj agadas. Iom pli granda organiziteco ŝajnas esti en la Filipinoj insuloj.

Pro tempomanko, kontaktoj kun izolitaj esperantistoj en sudamerikaj landoj sen organizita movado restis sporadaj kaj hazardaj. Ankoraŭ ne estas starigita sistema adresaro de la tieaj esperantistoj. Ĉiukaze vigla agado, subtenata de UEA, okazas minimume en Kolombio, Venezuelo kaj Kubo. En Kubo oni nun klopodas akiri ŝtatan agnoskon por Kuba Esperanto-Asocio. Por rapidigi la procedon, Kubaj esperantistoj turnis sin rekte al Fidel Castro. Ekzistas bonaj rilatoj kun la Kuba Unesko-komisiono. En Kolombio tre vigla agado per kursoj, prelegoj, radio-intervjuoj k.s. ŝuldiĝas ĉefe al Antiokia Esperanto-Ligo.

Grandsukcese tiu Ligo informadas kaj instruas en la Universitato de Medellín. Venezuelaj Esperanto-Asocio agas ĉefe en la ĉefurbo Caracas kun rimarkinda sukceso.

Estis lanĉita agado por produkti informilojn pri la Internacia Lingvo, kiuj estu kunligitaj kun la sociaj kondiĉoj en la landoj de la tielnomata Tria Mondo. Ili aperu laŭeble en afrikaj kaj aziaj landoj. Ĝis nun estis verkita nur broŝuro celanta afrikajn landojn. Post la kritikoj de kelkaj esperantistoj la aŭtoro modifis ĝin kaj nun planas ĝian aperigon. Bedaŭrinde ĝis nun troveblis tradukantoj nur por la franca kaj angla lingvoj, en kiujn la tuta broŝuro estas tradukita, sed tradukado al la araba, malagasa kaj svahila progresas tre malrapide. Ankoraŭ ne estis eble trovi kompetentan Azianon pretan verki ion similan por aziaj landoj, kvankam kelkaj Japanoj nun ekkonsideras la aferon.

Ankaŭ lanĉiĝis iniciato por produkti vortarojn 'Internacia Lingvo - loka lingvo' kaj lernolibrojn en lokaj lingvoj. Jam videblas kelkaj kuraĝigaj rezultoj. Kamboĝaj studentoj loĝantaj en Budapeŝto pretigis vortaron 'Esperantan - Kamboĝan', nun presatan en Budapeŝto. Manuskripto de vortaro 'Malagasa - Esperanta' jam estas preta kaj baldaŭ presota post kelkaj finpretigaj laboroj. En Hinda Unio oni pretigas vortarojn 'Esperantan - Hindian', 'Esperantan - Teleguan' kaj 'Esperantan - Tamilan'. Aperis ankaŭ gramatikoj en la Malagasa kaj en la Malta. En Zairo oni pretigas vortaron 'Esperantan - Lingalan'.

Kontaktoj kun ne-esperantistoj konsistas ĉefe el sendado de informa materialo al personoj, kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj en Afriko (materialo eldonita de TEJO estis sendita al kelkaj dekoj da homoj ĉefe en Tanzanio). Krome, unue el Paderborn (FRGermanio) kaj poste el Zagrebo (zorge de Internacia Kultura Servo) estis sendita informmaterialo pri 'Esperanto programita' al centoj da afrikaj gejunuloj interesiĝantaj pri korespondado kun eksterlando. La rezultoj estis tre kuraĝigaj kaj pelas IKS-n al daŭrigo de tiu agado.

En Japanio, ĉefe zorge de Kurisu kei, oni eklanĉis diskuton ankaŭ kun ne-esperantistoj pri la lingva problemo en Azio, pere de artikoloj en revuoj kaj debatoj.

Tre intensaj estis la kontaktoj ankaŭ kun esperantistoj loĝantaj en Eŭropo, Norda Ameriko kaj Usono.

Per tiu ĉi raporto UEA esprimas varman dankon al ĉiuj, kiuj favore reagis je alvokoj pri helpo al Esperanto-agantoj en Afrikaj kaj Aziaj landoj, kiuj kutime ne apartenas al la tre pagopova socia tavolo. Apartan mencion meritas la Svisa, Franca kaj Belga

Landaj Asocioj, kiuj daŭre helpis per sendado de franclingva materialo al Afrikaj petintoj. Same multe helpis la Brita kaj la Usona Landaj Asocioj per havigo de anglalingva materialo. La FR-Germana asocio helpis per mono al la Fondaĵo Azio-Afriko, kaj Hungara Esperanto-Asocio donis nemezureblan helpon per presado de materialo (interalie la vortaro 'Internacia - Kamboĝa'). Ne eblas mencii tie ĉi ĉiun unuopan helpinton, sed ilia agado montris, ke por esperantistoj 'solidareco' ne estas nur vorto uzinda en belaj oratoraĵoj.

Aparte notinda estas ankaŭ la ekinteresiĝo de Japanoj pri disvastigo de la Internacia Lingvo en Azio, kiun evidentigis pluraj signoj, ekzemple la konstanta helpo de esperantista grupo en Kioto al la regiona agado.

(3) Fakaj Asocioj kaj Faka Agado: La nombro de Fakaj Asocioj, aliĝintaj al UEA, estas 3, la nombro de kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj estas 19, post kiam la Komitato en Kopenhago akceptis la Rotarian Asocion de Esperantistoj. Bedaŭrinde tute perdiĝis la kontakto kun Universala Invalida Esperanto-Asocio.

Dank' al la klopodoj de prof. B. Popović, prezidanto de Internaica Scienca Asocio Esperantista, la Mondfederacio de Sciencistaj Laboristoj decidis eldoni sian revuon, Scienca Mondo, ankaŭ en Esperanto. Skolta Esperanto-Ligo efektivigis kampanjon dum la Monda Ĵamboreo en Norvegio kaj atingis kontaktojn kun pluraj altranguloj de la skolta movado; plie ĝi ellaboris planon por la utiligo de la donaco de f-ino Betty Salt. Ankaŭ pluraj aliaj Fakaj Asocioj flegas intimajn rilatojn kun siaj respektivaj internaciaj profesiaj organizaĵoj, kaj klopodas ĉiam pliintensigi tiujn rilatojn.

Proksimume 50% de la aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj raportis pri sia agado en la pasinta jaro. La raportoj montras, ke la asocioj (registritaj en la Jarlibro) grandparte bone kaj celkonscie laboras. Dum la jaro Universala Medicina Esperanto-Asocio transiris de stato de 'kunlaboranta' al tiu de 'aliĝinta' Faka Asocio, dum akceptiĝis jenaj novaj kunlaborantaj asocioj: Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj, Rotaria Asocio de Esperantistoj kaj Bahaa Esperanto-Ligo. La rilatoj kun la juristoj restas nebulaj. Fine de aprilo 1976 estis ellaborita propono pri 'Interkonsento pri kunlaboro inter I.L.E.I. kaj UEA', pri kiu la kompetentaj organoj voĉdonos.

Esperanto-Ligo Filatelista raportas, ke kunfandiĝis kun ĝi la Amika Rondo de Esperantaj Kolektantoj. La estrarano pri Faka Agado daŭrigas siajn klopodojn por pliintensigi la kunlaboradon inter UEA kaj la Fakaj Asocioj kaj por akiri kontakton kun aliaj fakaj asocioj sen rilatoj kun UEA. Esperantista Ŝak-Ligo Internacia raportas, ke ĝi ellaboris fakterminaron. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio konstante laboradas pri terminaraj demandoj. Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) nun finpretigas la Aŭtomobilfakan Vortaron en 7 lingvoj, kiun terminologian laboron ĉefe prizorgas kaj kunordigas s-ro Boffejon (Svislando). La granda Nederlanda eldonejo Kluwer, kiu jam prizorgis la eldonon de la Komerca - Ekonomika Vortaro, principe deklaris sin preta eldoni ankaŭ la aŭtomobil-vortaron. Ankaŭ en pluraj fakoj

interne de Internacia Scienca Asocio Esperantista progresas terminaraj laboroj. Kristana Esperantista Ligo Internacia raportas pri sukcesa agado ekfunkciigi du veturantajn okulklinikojn 'Doktoro Zamenhof' en Afriko, kaj jam komencis labori por tria projekto.

13. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

(1) Strukturo kaj Celoj de CED: Dum la unua parto de 1975 la internacia diskutado pri la estonteco de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo daŭris sub gvido de la Aganta Direktoro de la Centro, d-ro Jonathan Pool (Ŝtata Universitato de Novjorko, Usono). Surbaze de la ricevitaĵoj li verkis raporton (revuo *Esperanto* aprilo 1975) kiu enhavis aron da proponoj pri la organiziĝo kaj celoj de CED en la venontaj jaroj. La raporto estis bazo de diskutoj en la Komitato kaj en aparta fakkunsido dum la Universala Kongreso en Kopenhago. La Komitato ĝenerale aprobis la raporton kaj rekomendis, ke CED emfazu ĉefe esploradon pri lingvaj problemoj, lasante al la informaj organoj de UEA mem la informadon pri Esperanto - kvankam kunlabore kun CED. Ĝi ankaŭ rajtigis starigon de Estraro de CED. Dum sia kunsido en januaro 1976, la Estraro de UEA nomis kiel estraranojn de CED dum tiu jaro d-ron J. Pool (Usono), s-ron D. Blanke (GDR), kaj d-ron Ulrich Lins (FRG).

(2) Dokumentado: Post la transigo de la arkivo de CED al la Centra Oficejo, la ĝeneralan registran laboron gvidis la Direktoro de la CO. CED ankaŭ kunlaboras en la kompilado de bibliografio de vortaroj en la Internacia Lingvo kaj en diversaj lingvaj projektoj, eldonota de granda internacia eldonejo.

(3) Novajletero por Interlingvistoj: Aperis du numeroj de tiu ĉi ligilo inter fakuloj pri Esperantologio kaj interlingvistiko. La eldonaĵo aperas sub aŭspicio de CED kaj redaktas ĝin d-ro U. Lins.

(4) Esperanto-Dokumentoj: Tiu nova serio de studoj kaj raportoj pri Esperanto kaj la Esperanto-movado komencis aperi en 1976, sub redakto de d-ro H. Tonkin. Membroj de la redakta komitato estas s-roj G. Makkink kaj E.L.M. Wensing. Oni antaŭvidas aperigon de proksimume po dek dokumentoj jare en du serioj - anglalingva (A) kaj Esperanta (E). Pliaj lingvoj espereble sekvos. La serioj ne estos identaj, kvankam la plimulto de la dokumentoj aperos en ambaŭ. La unuaj dokumentoj pritraktas la rilatojn inter UEA kaj Unesko (A kaj E), la laboron de UEA 1974-75 (A) kaj la 60-an Universalan Kongreson (A). La serio inkluzivas studojn de W. Auld pri la poezia lingvo en Esperanto (A), de U. Lins pri UEA en la servo de la paco (A kaj E) kaj de H. Tonkin pri Esperanto-studoj (A kaj E). Dokumentoj pri radioelsendoj pritraktas la rolon de Esperanto tra kvindek jaroj en radio (A kaj E). Ĉiuj dokumentoj havas proksimume saman formon, kun pli malgranda formato ol la iamaj CED-Dokumentoj sed meze pli multaj paĝoj. UEA utiligos ilin en la ekstera agado kaj la informado ĝenerale, kaj ili estas ankaŭ aboneblaj (25 guld. por dek dokumentoj).

(5) La Monda Lingvo-Problemo: Redaktas tiun ĉi prestiĝan eldonaĵon de CED d-ro Richard Wood (Universitato Adelphi, Usono). Post iom longa paŭzo,

la eldonritmo nun denove stabiligis, sed la volumoj ne plu estas ligitaj al la kalendararo. En la raporta jaro aperis la numeroj 14 kaj 15 (de vol. 5) kaj 16 (de vol. 6). *LMLP* nun firme establigis kiel unu el la ĉefaj socilingvistikaj periodaĵoj. Ĝiaj artikoloj estas verkitaj en pluraj naciaj lingvoj kun ampleksaj resumo en Esperanto.

(6) **Aliaj Agadoj:** La tuta kampo de esploro kaj dokumentado, kiu entenas ankaŭ bibliografion kaj bibliotekan laboron, fakajn studojn, kaj la evoluigon de la lingvo por teknika uzado, estas tre ampleksa. Granda parto de tiu agado okazas en la fakaj asocioj (menciindaj estas la Terminologia Centro de ISAE sub gvido de s-ro R. Eichholz, kaj la eldonaĵoj *Scienca Revuo* kaj *Biblia Revuo*), en la landaj asocioj (la biblioteko de Brita Esperanto-Asocio, la eldonaĵoj *Hungara Vivo*, *Budapeŝta Informilo*, ktp.) aŭ ekster la rondoj de UEA (la esploroj de la Soveta Akademio de Sciencoj, la Kultura Centro Esperantista en Svislando, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la Amerika Asocio pri Esperanto-Studoj).

(7) **Estonta Agado:** CED antaŭvidas lanĉon de eduka kampanjo inter la membroj de UEA pri lingvaj demandoj kaj lingvoj ĝenerale, cele al kreo de baza scio utiligebla en la informado, kaj ĝi ankaŭ esploras eldonadon de nova periodaĵo en kiu aperu unuaj versioj de esperantologiaj kaj lingvistikaj studoj, aperigotaj en nacilingvaj periodaĵoj post kritiko fare de esperantlingvaj fakuloj. Aliaj agadoj daŭros kaj intensiĝos laŭ la homaj kaj financaj eblecoj.

14. FINAJ VORTOJ

La ĉi-jara Raporto de la Estraro respegulas, en preskaŭ ĉiuj ĉapitroj kaj subĉapitroj, la impetan agadon de UEA sur plej diversaj terenoj. Kun granda elano kaj sindediĉo al la multaj taskoj plenumendaj, la Komitato, Estraro kaj sennombraj lojalaj membroj de la Asocio streĉis la fortojn por venki la barojn, preni sur sin novajn iniciatojn kaj svingi la movadon antaŭen, puŝante nian aferon el la fermiteco de la propraj rondoj. Grandparte ŝuldiĝas tiu korvarmiga inspiriĝo al la bona morala etoso, kiu animas la Asocion en ĉiuj tavoloj. Ĝi jam senteble manifestiĝis dum la amikeca kaj laborriĉa 60-a UK en Kopenhago kaj eĉ plintensigis dum la posta periodo. Ĝin ĉiutage atestas la efikeco kaj kohereco de la Asociaj gvidorganoj. Ĝin ankaŭ konfirmas la okulfrappe pli-boniĝinta financa situacio de UEA.

Ĉiuj fortoj de la Asocio estas koncentritaj sur la kvantego da pozitiva kaj konstrua laboro ankoraŭ farenda, sur la fundamenta refortikigo de ĉiuj tavoloj, ĉiuj centroj de aktiveco de nia movado, sur la daŭra plialtigo de la nekontestebla intelekta prestiĝo de la Internacia Lingvo, sur la cementado de nia tutmonda solidareco kaj de niaj publikaj rilatoj kun eksteraj influhavaj instancoj, sur la penetrado en la sanktejojn de la reganta skeptikismo, sur la renovigo de nia multifaceta agado.

Strikte en konformo kun la statuto de la Asocio kaj en la spirito de la Kopenhaga rezolucio pri politika neŭtraleco, la Estraro kaj Komitato de UEA senlace daŭrigas la laboron, plenumos laŭeble sian mision, por la bonfarto de la Asocio, por la realigo de la idealoj de ĝia fondinto.

Financaj aldonaĵoj

SPEZOJ DE UEA EN 1975

KOSTOJ	Rezultoj	Buĝeto
Salajroj malnete	158 198,98	180 574
Sociaj asekuroj, devigaj al UEA	31 514,36	39 726
	189 713,34	220 300
Minus kompensoj pro malsano	- 1 590,41	- 2 500
	188 122,93	217 800
Oficejaj elspezoj		
Afranko kaj telefono	13 713,93	13 000
Presadoj	4 798,84	10 000
Materialoj	4 458,42	
Riparo de maŝinoj	1 891,58	2 200
Revizoroj, trinkaĵoj, diversaĵoj	1 947,52	1 600
	26 810,29	26 800
Fotokopiado	7 902,23	12 000
Minus vendoj	- 7 188,86	- 10 000
	713,37	2 000
Oficeja domo		
Varmigo, lumo ktp.	4 552,70	3 500
Riparoj, purigiloj	1 571,44	4 000
Rezervo por riparoj en 1976	20 000,00	-
Asekuro kaj impostoj	2 077,61	1 600
	28 201,75	9 100
Minus ludono de loĝoĉambroj	- 1 000,00	- 1 400
	27 201,75	7 700
Revuo "Esperanto"		
Preskosto	26 854,00	27 000
Ekspedkosto	21 160,49	23 000
Kovertoj ktp., minus vendoj	1 883,76	2 000
	49 898,25	52 000
Minus anoncoj	- 8 813,40	- 4 000
	41 084,85	48 000
Jarlibro kaj Estrara Raporto		
Preskosto	14 437,00	15 000
Ekspedkosto	5 152,21	5 000
Kovertoj	649,95	600
	20 239,16	20 600
Minus anoncoj	- 6 933,50	- 6 000
	13 305,66	14 600
Revuo "Kontakto"		
Preskosto	4 381,53	5 000
Ekspedkosto kaj banderoloj	1 712,77	2 500
	6 094,30	7 500
Minus anoncoj	- 94,30	-
	6 000,00	7 500
Vojaĝ- kaj restad-kosto		
Oficistoj (ĉiutagaj kosto)	3 438,75	3 000
Oficejaj (kongresaj k.s.)	4 856,98	4 000
Estraraj	5 155,89	3 000
Volontulaj helpantoj en la C.O.	1 345,40	-
	14 797,02	10 000

Ĝeneralaj elspezoj		
Bankkostoj kaj kurzdiferencoj	3 656,37	1 500
Estraraj elspezoj (inkl. TEJOn)	6 102,52	5 500
Premioj, donacoj kaj ceteraj	2 069,07	1 500
	<u>11 827,96</u>	<u>8 500</u>
Deprezoj: Domo (ĉ. 1%)	1 300,00	1 400
Maŝinoj kaj mebloj, 10%	6 295,11	6 000
	<u>7 595,11</u>	<u>7 400</u>
Sumo de la kostoj	337 458,94	350 300
Gajno por 1975, post rezervo	26 467,34	-
	<u>363 926,28</u>	<u>350 300</u>

RIMEDOJ	Rezultoj	Buĝeto
Kotizoj (nete)		
MJ	13 881,31	
MA	168 643,13	
MA-K	4 383,15	
MSZ	20 876,12	
J-MJ	564,86	
J-MA	3 902,04	
Individuaj membroj	212 250,61	228 000
Asociaj membroj	19 445,50	17 000
Simplaj abonoj je <i>Esperanto</i>	4 762,93	4 900
Simplaj abonoj kongresaj	7 910,44	7 000
Kolektivaj abonoj	6 062,50	-
Fakaj asocioj	1 333,53	1 000
Abonoj <i>Kontakto</i> , + ½ de pat.	2 438,74	3 200
	<u>254 204,25</u>	<u>261 100</u>
Donacoj al la ĝenerala kaso	12 957,31	2 000
Libroservo	62 702,62	37 000
Abonservo	556,47	2 000
Grafikaj laboroj	6 168,48	5 000
Kongresoj		
60-a UK: 20% de kotizoj	18 554,61	16 000
31-a IJK de TEJO	-	1 800
	<u>18 554,61</u>	<u>17 800</u>
Rento (nete)	3 104,20	4 000
Diversaj enspezoj	2 037,84	4 000
Kompenso de kostoj el kapitalo		
Dumvivaj membroj: 983 x 3,50	3 440,50	3 500
Propaganda konto: CED-laboroj	200,00	1 700
	<u>3 640,50</u>	<u>5 200</u>
Sumo de la rimedoj	363 926,28	338 100
Deficito	-	12 200
	<u>363 926,28</u>	<u>350 300</u>

BILANCO DE UEA JE LA 31-a DE DEC.

AKTIVOJ	1975	1974
Monrimedoj		
Kurantaj bankkontoj	6 857,49	2 860,47
Ŝparkontoj	22 633,80	28 462,89
Poŝtaj ĝirkontoj	23 772,78	10 621,85
Poŝtaj ŝparkontoj	29 875,98	-
Kaso kaj respondkuponoj	666,40	253,26
	<u>83 806,45</u>	<u>42 198,47</u>
Valorpaperoj	48 451,32	39 695,10
Ricevotaj enspezoj	11 893,01	18 825,95
Antaŭpagitaj elspezoj	447,61	422,60

Debitoroj	156 184,76	126 306,32
Provizoj		
Libroservaj	169 609,69	213 168,11
Presaĵoj, materialoj k.s.	19 225,42	16 450,80
	<u>188 835,11</u>	<u>229 618,91</u>
Inventaro: maŝinoj, mebloj	29 404,79	35 158,90
Garantiaj sumoj	130,00	130,00
Domo de UEA	131 800,00	133 100,00
Tero en Aspremont	1,00	1,00
	<u>650 954,05</u>	<u>625 457,25</u>

PASIVOJ

Rezervo je stokvaloro libroj	15 000,00	15 000,00
Antaŭricevitaj enspezoj	89 963,44	75 327,41
Pagotaj elspezoj	48 682,14	53 310,33
Kreditoroj	145 924,67	186 074,66
Ŝparkontoj de membroj	3 978,68	20 978,68
Fondaĵoj por specialaj celoj		
Azio-Afriko	775,09	674,23
Canuto	177,69	679,83
CED	2 644,25	-
Enciklopedio	279,67	264,21
Eldona Fondaĵo	654,59	654,59
Financa Programo	5 494,50	-
Kongresa Rezerva Fondaĵo	18 002,61	16 410,56
Oficeja ilaro	200,00	-
Propaganda konto	27 584,34	10 964,63
TEJO	1 203,80	540,64
	<u>57 016,54</u>	<u>30 188,69</u>
Asocia kapitalo		
Dumvivaj membroj	252 554,52	235 915,01
Cetera kapitalo	37 834,06	8 662,47
	<u>290 388,58</u>	<u>244 577,48</u>
	<u>650 954,05</u>	<u>625 457,25</u>

FONDAĴOJ KAJ KAPITALAJ KONTOJ

AZIO-AFRIKO	Elspezoj	Enspezoj
Saldo je 1975 01 01		674,23
Donacoj		766,87
Lernolibroj k.s. donacitaj	666,01	
Saldo je 1975 12 31	775,09	

CANUTO

Saldo je 1975 01 01		679,83
Donaco de Inst. Hodler 68		2 300,00
Ceteraj donacoj		2 045,58
Membrokotizoj kaj libro	4 847,72	
Saldo je 1975 12 31	177,69	

CED

3% de <i>Esperanto en perspektivo</i>		2 603,16
Donacoj, vendo de CED-dok.		100,20
Elspezoj de aganta direktoro	59,11	
Saldo je 1975 12 31	2 644,25	

PROPAGANDA KONTO

Saldo je 1975 01 01		10 964,63
Parto de krompagoj Kopenh.		1 235,00
Licencpago de Kopenhago		9 277,31

45% de profito Kopenhago	7 164,22
Donacoj	438,67
Lernolibroj k.s. donacitaj	1 283,49
Kostoj de la C.O. por CED	212,00
Saldo je 1975 12 31	27 584,34

TEJO

Saldo je 1975 01 01	540,64
Subvencio de Eŭropa Jun.Fond.	1 923,53
Ceteraj donacoj	436,60
50% de patronoj A kaj B	226,56
Subvencio al KER de TEJO	1 923,53
Saldo je 1975 12 31	1 203,80

DUMVIVAJ MEMBROJ

Saldo je 1975 01 01	235 915,01
13 novaj DM-oj	10 839,15
Kurzgajno je valorpapiroj	9 240,86
Kostoj de DM-oj: 983 x 3,50	3 440,50
Saldo je 1975 12 31	252 554,52

CETERA KAPITALO

Saldo je 1975 01 01	47 401,26
Deficito 1974	38 738,79
Heredaĵoj Simpkins, Hyde	590,50
Donacoj	2 398,50
Juraj kostoj heredaĵo Steffering	284,75
Saldo je 1975 12 31	11 366,72

REVIZORA RAPORTO

pri la librotenado kaj agado
de la Centra Oficejo en la jaro 1975
(Statuto, art. 40)

Plenumante la artikolon 40 de la Statuto de UEA, ni, subskribintoj, T. Boersma kaj P. Peeraerts, komitatanoj-revizoroj, kunvenis la 22-an de majo 1976 en la C.O. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ d-ro V. Sadler, la Direktoro de la C.O., kaj s-ro G. Maertens, revizora konsilanto kaj same kiel subskribintoj membro de la Komisiono pri Financoj kaj Administrado.

Ni ricevis ĉiujn deziritajn informojn, inkluzive la skriban ateston de la profesia revizoro, s-ro S.H. Brongersma. Pri la fakto, ke la librotenada prokrastiĝo konstatita pasintjare, plene malaperis, ni kun kontento raportas. Same ni konstatis kun ĝojo kaj kontento, ke fakte la profita rezulto en la pasinta jaro sumiĝis 46 467,34 gld. Konante la neceson de riparoj kaj similaj en la oficeja domo, ni aprobas ke — ne antaŭvidite en la buĝeto pri 1975 kaj do devie de ĝi — por tiu celo el la profito estis prenitaj 20 000 gld.

Ekzistu direktivoj, kiuj donacoj, heredaĵoj kaj similaj, destinitaj por helpo al la Esperanto-movado, eniru la Fondaĵon Hodler 1968 kaj kiuj estu disponigataj al la Financa Programo de la Esperanto-Movado.

Tro alta ni konsideras la debitoran sumon, kiu estas ja apenaŭ malpli alta ol la tutjara vendosumo. Oni

provizore tamen atendu, ĉu la ĉi-rilataj klopodoj bone influos.

Rilate la Administradon, oni povas post tridek jaroj da ekzistado de la Serva Centro, forte pridubi ĝian utilon. Ni sugestas esplori, ĉu ĝi ne estas malfondebla. Estas certe, ke ankaŭ en la ĉi-tema jaro ĉiuj funkciuloj kaj geoficistoj ĝismaksimume faris siajn eblojn. Ni, kun danko pro tio al ĉiuj, proponas al la Komitato, ke ĝi malŝarĝu la estraron pro la financa gvidado de la Asocio en 1975.

Antwerpen/De Hoeve

P. Peeraerts, T. Boersma

REVIZORA DEKLARO

PRI LA JARO 1975

La subskribinto, S.H. Brongersma, Federa Imposto-konsilisto en Leiderdorp, per ĉi tio deklaras, ke li per ĉiufoje specimenaj provoj kontrolis la administrajn rezultojn pri 1975 de la unuiĝo Universala Esperanto-Asocio.

Samtempe li kontrolis ankaŭ, per specimenaj provoj, la rezultojn de la Kongreso okazinta en 1975 en Kopenhago.

Sekve de tio li deziras deklari, ke li renkontis neniun malregulaĵon, kaj li tial deklaras sian konsenton pri la ciferoj prezentitaj en la ĉi-kuna financa superrigardo.

Leiderdorp, la 20-an de majo 1976

S.H. Brongersma, Federa Impostokonsilisto.

(traduko el la nederlanda originalo)

BUĜETO

DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 1977

	Buĝeto 1977	Rezultoj 1975
KOSTOJ		
Salajroj	190 000	188 122,93
Oficejaj elspezoj		
Afranko kaj telefono, nete	16 000	13 713,93
Presadoj kaj materialoj	12 000	9 257,26
Riparo de maŝinoj	4 000	1 891,58
Revizoroj, trinkaĵoj, diversaĵoj	2 500	1 947,52
	34 500	26 810,29
Fotokopiado, nete	1 000	713,37
Oficeja domo		
Varmigo, lumo ktp.	5 000	4 552,70
Riparoj kaj purigiloj	4 000	1 571,44
Rezervo por riparoj en 1976	-	20 000,00
Asekuro kaj impostoj	2 600	2 077,61
	11 600	28 201,75
Minus ludono de loĝoĉambroj	-	- 1 000,00
	11 600	27 201,75
Revuo "Esperanto", nete	45 000	41 084,85
Jarlibro kaj Estrara Raporto	13 500	13 305,66
Revuo "Kontakto", nete	6 000	6 000,00
Vojaĝ- kaj restad-kostoj		
Oficistaj (ĉiutagaj)	2 000	3 438,75

Kongresaj	6 000	4 856,98
Estraraj	6 000	5 155,89
	14 000	13 451,62
Volontula Servo	15 000	1 345,40
Korespondkostoj estraraj k.s.	8 000	6 102,52
Ĝeneralaj elspezoj		
Bankkostoj kaj kurzdiferencoj	1 500	3 656,37
Premioj, donacoj kaj ceteraj	2 000	2 069,07
	3 500	5 725,44
Deprezoj: Domo	1 400	1 300,00
Inventaro (maŝinoj kaj mebloj)	8 000	6 295,11
	9 400	7 595,11
	351 500	337 458,94
Gajno	-	26 467,34
	351 500	363 926,28

RIMEDOJ

Kotizoj (nete)

MJ	12 600	13 881,31
MA	195 200	168 643,13
MA-K, J-MJ, J-MA, MSZ	-	29 726,17
Individuaj membroj	207 800	212 250,61
Asociaj membroj	24 000	19 445,50
Simplaj abonoj "Esperanto"	4 800	4 762,93
Simplaj abonoj "Kontakto"	2 400	2 438,74
Kolektivaj abonoj	11 500	6 062,50
Kongresaj abonoj	6 000	7 910,44
Societo Zamenhof, aparte	15 000	-
Fakaj organizaĵoj	1 000	1 333,53
	272 500	254 204,25
Donacoj	6 000	12 957,31
Libroservo kaj abonservo	35 000	63 259,09
Grafikaj laboroj	10 000	6 168,48
Kongresoj		
Universala Kongreso	13 000	18 554,61
IJK de TEJO	1 000	-
	14 000	18 554,61
Rento	6 500	3 104,20
Poŝtmarkoj kaj aliaj enspezoj	2 000	2 037,84
Kompenso de kostoj el kapitalo		
Dumvivaj membroj	3 500	3 440,50
CED	2 000	200,00
	5 500	3 640,50
	351 500	363 926,28

60-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago, 1975

SPEZOKONTO (en guldenoj)

ELSPEZOJ	Rezulto	Buĝeto
Pago al UEA: 30% de kotizoj	27 831,92	30 328
Repago de kotizoj al helpantoj	1 597,18	1 500
Makleraĵo por kotizperantoj	1 990,32	1 600
Infana kongreseto	3 426,78	3 751
Inaŭguro: floroj, muziko k.s.	533,94	1 500
Junulara vespero	228,80	-
Teatraj vesperoj	7 052,08	8 000
Dana vespero: honorarioj k.s.	4 314,86	5 000
Tivoli-vespero	1 100,00	1 650
Internacia vespero	2 509,50	2 500

Balo: muziko k.s.	660,00	1 100
ISU: honorarioj	1 091,67	1 800
Bankedo	10 623,36	11 220
Kongresejo	37 150,50	35 187
Aliĝilo: preskostoj	1 127,50	1 041
Unua Bulteno (teksto)	537,00	707
Dua Bulteno: preskostoj	2 495,00	2 996
Kongresa Libro, suplemento	6 839,00	9 000
Glumarkoj	460,50	460
Insignoj	1 262,25	1 153
Presajoj kaj fotokopioj	1 890,29	2 000
Materialoj*	1 457,98	2 000
Reklamado	55,28	500
Gazetara Servo	771,88	800
Afranko kaj telefono	5 047,12	6 000
Transportoj	1 107,49	250
Veturadoj enlandaj	13,95	400
Bankkostoj kaj diversaĵoj	1 114,69	1 288
Profito	15 920,49	-
Sumo de la elspezoj	140 211,33	133 731

ENSPEZOJ

	Rezulto	Buĝeto
Kotizoj (1095 pagintoj)	92 773,08	101 093
Simbolaj aliĝoj	-	100
Infana kongreseto: kotizoj	3 396,98	3 190
Subvencio Adoptaj Gepatroj	29,80	1 268
Ekskursoj (nete)	12 937,11	4 382
Bankedo (ĉ. 290 personoj)	11 954,80	12 540
Libroservo: 50% de neta gajno	979,57	1 400
Glumarkoj	363,90	1 000
Anoncoj kaj reklamiloj	1 795,00	1 820
Subvencioj kaj donacoj*	11 274,22	1 760
Loĝmakleraĵo (340 personoj)	2 600,50	4 400
Postkongresoj: kontribuo	528,00	528
Lupagoj de fakaj kunsidoj	405,16	250
Rento	571,84	-
Diversaj enspezoj	601,37	-
Sumo de la enspezoj	140 211,33	133 731

* La kontoj "Materialoj" kaj "Donacoj enhavas po 660 gld. pro donaco de la familio Kühlmann en la formo de senpagaj materialoj.

KOREKTOJ DE LA ESTRARA RAPORTO 1974/1975

p. 29 — Ĉapitro XIII. Titolo ŝanĝita al "FINA RIMARKO".

p. 42 — Buĝeto de UEA por 1976. La unuaj eroj devus esti:

Salajroj malnete	150 800
Sociaj asekuroj devigaj	31 650
	182 450

p. 44 — Buĝeto 1976. La sumo de enspezoj devus esti 327 350.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (unu internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Taŭga legolibro por lernantoj kaj progresintoj aperis: *Forkaptita* de R.L. Stevenson, fama romano pri Skotlando; elangligis Albert Goodheir. "Traduko admirinda" (W. Auld). £2.25, inkluzive sendelspezojn. Eldonejo KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Samadrese: Eŭripido, *Bakĥantinoj* £1.20; Goodheir, *Merlo sur menhiro* (poemaro) £0.85.

Kolektanto serĉadas kaj interŝanĝadas biero-subumojn el la tuta mondo. Mi kontraŭdonas ankaŭ p.m. Harry Borchert, D-330 Goslar 2, Hindenburgstr. 4, FRG.

La N. Droz Mondpacmovado, poŝtkesto 8047, Zurich, Svislando, afable petas ĉiun samtempulon, ke ĉiutage li afable sian proksimulon demandu: **Ĉu ni vivas por mortigi aŭ ami unu la alian?** Tiam ĉiu konscios, ke hodiaŭ ĉiuj armeoj fariĝis superflujaj. Al ĉiu ŝtato sufiĉas nacia afabla policaro. Samtempe ĉiu terano postulu, ke antaŭ la jaro 2000 neniu armeo plu ekzistu! Tiam mondpaco por ĉiam regos. Elkore mi salutas vin,
Numa DROZ

ANALIZA SKOLO. LIBERECO DE OPINIO.

PRIVATE mi pruvos al ĉiu analizemulo, kiu ĝentile skribos al mi, ke "itismo" estas erara teorio. Nepre diru viajn pravigajn motivojn pri ĝi, kaj kunsendu 3 respondkuponojn. L. Mimó, str. J. Comas, 19. Sabadell, Hispanujo. Pri tiu ĉi kaj multaj aliaj ne malpli gravaj demandoj:

Kompleta lernolibro de regula Esperanto
Perfekteco de la Esperantaj verboj

En regula, strikte Zamenhofa Esperanto:

Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo



desinfektado
higieno

Altkvalitaj produktoj

aerrefreŝigo	betonhardilo
tualetpurigilo	insekticidoj
tubopurigilo	tankprotektilo
senkrustigilo	multaj specialaj
herbicidoj	produktoj

Kemia Fabriko Bruno Vogelmann,
D-7180 Crailsheim, FR Germanio


Ni petas ĉiujn kiuj posedas manuskriptojn por eldoni, kaj pretas mem pagi preskostojn: Turnu vin al IKS, kiu prizorgos tion **plej malmultekoste**. Internacia Kultura Servo, P.f. 499, YU-41001 Zagreb, Jugoslavio.

Mi korespondas kun gesamideanoj pri turismo, naturo, dendrologio, botaniko kaj pri tio interŝanĝas ilustritajn materialojn. Dénes Demeter, 1213 Budapest XXI, Damjanich u. 57, Hungario.

Arkitektoj bonvolu skribi por serioza korespondado al Rosa Maria, Braz Bernardino 123; 36.100 - MG, Brazilo.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, skribu sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) por peti cirkuleron kun speciale utilaj informoj.

EKZAMENO E: Sur la paĝo 115 de la junia numero de nia revuo estas dirite, ke la respondo al la demando 4 aperos en ĉi tiu numero de la revuo. Ni kun pardonpeto informas, ke tiu rubriko estos trovebla nur en la oktobra numero de la revuo.



REĜO LEAR estas majstra traduko de majstroverko en prestiĝa eldonserio de UEA. 160p. 21cm. Broŝurita 9,—, bindita 12,— gld. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe vialanda libroservo.

UEA serĉas du novajn oficistojn

por respondecaj funkcioj en la Centra Oficejo (ĝenerala administranto de la C.O. kaj Konstanta Kongresa Sekretario).

Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo, administra kaj komerca talento, flua sci-povo de Esperanto kaj laŭeble ankaŭ de aliaj lingvoj.

La salajroj kaj datoj de eklaboro estas interkonsentotaj. Sinproponoj estu direktitaj kiel eble plej baldaŭ — prefere antaŭ la 30a de junio — al la direktoro de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Por pliaj detaloj vidu la artikolon de la prezidanto sur la paĝo 81.

EKZISTAS MALMULTAJ ESPERANTAJ PROZVERKISTOJ

UNU EMINENTA ESTAS JEAN FORGE

Liaj verkoj	Prezoj en gld.
<i>Abismoj</i> , unua romano lia. 149p.	7,00
<i>Saltego trans jarmiloj</i> , fantazia romano pri vojaĝo al la antikva Romo. 192p.	9,00
<i>Mr Tot aĉetas mil okulojn</i> , mirinda aventuro de riĉulo spionanta. 242p.	12,00
<i>La verda raketo</i> , humuraj rakontoj pri esperantistoj kaj Esperantujo. 148p.	7,00
<i>Mia verda brevierio</i> , antaŭe ne eldonita verko. Memoraĵoj de la aŭtoro. La plej interesa el la tuta serio, kies ĉiu kapablas kapti la spiriton de la leganto. 266p.	13,50

**GRAVA LITERATURA SERIO, HAVINDA KAJ
LEGINDA AL ĈIU SERIOZA ESPERANTISTO,
RICEVEBLA EN VIA LIBROVENDEJO
KAJ ĈE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

la monda lingvo- problemo



Usonon, Kanadon, Portorikon, FR Germanion, Etiopion, Sovetan Union, Hindan Union, Israelon, Brition kaj aron da aliaj landoj ampleksas la enhavo de la plej novaj numeroj de la plurlingva revuo *La monda lingvo-problemo*. Lastatempe aperis la numeroj 15 (la lasta en la volumo 5) kaj 16 (la unua de la volumo 6). Du pliaj numeroj estas intertempe jam kompostitaj. *LMLP* aparte legindas por ĉiu, kiu interesiĝas pri lingva politiko, sociologio, lingvo-instruado kaj rilataj temoj, kiel ankaŭ por ĉiuj aktivaj laborantoj por Esperanto, kiuj sentas la bezonon de pli profunda konatiĝo kun la lingvaj problemoj, kiujn Esperanto celas solvi. Abonprezo (1 volumo = 3 numeroj) 30,— gld. (por Nederlando 31,20). Unuopaj numeroj kostas 12,— gld. (por Nederlando 12,48 gld.).

Abonu la revuon ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.